EL POPOLA ĈINIO

人民中國報道

10
1972

Sub la direktado de la linio de unuiĝo kaj venko de la Naŭa Kongreso de la Partio, la Fera-Ŝtala Kompanio de Benhi finkonstruis, en la kuranta jaro, novan altfornon, kiu jam komencis produkti.

Ŝanĝoj de la Ĉangĉuna Fervojo

La Ĉangĉuna Fervojo jam havas historion de pli ol 70 jaroj. Ĝi estas unu el la gravaj trafikaj linioj en nordorienta Ĉinio. En la malnova socio, la laboristoj kaj oficistoj de tiu fervojo multe suferis de la subpremado kaj sklavigado de imperiismo kaj la reakciaj regantoj. Post la Liberiĝo, la fervojo revenis en la manojn de la popolo kaj la laboristoj kaj oficistoj fariĝis ĝiaj mastroj. Sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio kaj Prezidanto Maŭ, ili rapide ŝanĝis la postiĝintan fizionomion de la fervojo. Nun la jara kvanto de varoj kaj pasaĝeroj transportataj de tiu fervojo pluroble superis la rekordon en la historio, nombro da kadroj kaj teknikistoj devenintaj de laboristoj rapide kreskas kaj ilia vivo senĉese pliboniĝas.

Konduktorinoj de la Ĉangĉuna Stacio tutkore servas al la pasaĝeroj kaj ricevis laŭdojn de la amasoj.

Streĉa laborado de la ĉangĉuna lokomotiva sekcio en nokto



Lokomotivisto Tian Vejjong (la meza) estas elektita kiel membro de la Gilin-provinca Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio. Li atingis bonan sukceson de sekura veturado dum 14 jaroj kun superplenumo de la ŝarĝotransporta normo je 120,000 tunoj.

En la infanĝardeno de la Ĉangĉuna Fervojo

Laboristoj kaj oficistoj de la Ĉangĉuna Fervojo en la legoĉambro de la Fervojista Kultura Palaco

Kun la tago-post-taga boniĝado de sia vivo, la laboristoj kaj oficistoj de la Ĉangĉuna Fervojo disvolvas postlaboran sportan aktivadon. Jen iras maĉo de glacia hokeo.



Trakoŝargo sur la Cangóuna Fervojo

ĈENG ĈUAN:

20-jara Funkciado de la Ĉengdu-Ĉongking-a Fervojo

FORPASIS dudek jaroj post la naskiĝo de la Ĉengdu-Ĉongking-a Fervojo en Siĉuan-provinco — la unua fervojo konstruita de la nova Ĉinio.

Tiu ĉi fervojo estis projektita de nia lando mem kaj konstruita per niaj propraj materialoj en kompare granda rapideco. Ĝia finkonstruo efektivigis la deziron de la siĉuan-aj popolanoj dum duono de jarcento kaj ludas gravan rolon en akcelado de la socialisma konstruado de tiu provinco.

EFEKTIVIGO DE LA DEZIRO DE DEKOJ DA JAROJ

La fervojo kun totala longeco de 505 kilometroj trapasas la siĉuan-an basenon transirante multajn montojn kaj riverojn. La dek gubernioj kaj urboj kaj pli ol 50 urbetoj ambaŭflanke de la fervojo formas la koran zonon de Siĉuan, kie densas loĝantoj kaj abundas produktaĵoj.

Antaŭ la Liberiĝo, la tiea trafiko estis malfacila pro altaj montoj kaj danĝeraj riveroj. La ĉefaj transportaj instrumentoj estis nemultaj aŭtoj kaj lignaj ŝipoj kun malgranda transporta kapablo kaj alta transporta kosto, tial la tieaj abundaj agrikulturaj kaj flankokupaj produktaĵoj ne povis esti transportataj aliloken. Kaj la ĉiutagaj industriaj bezonaĵoj estis tro multe kostaj. En montregionoj, oni devas pagi por unu lavtuko per dekoj da kilogramoj da rizo, kaj por 0.5 kg. da salo per dudek litroj da maizo. Tial la laborantaj popolanoj de la urboj

La ŝtona Vang-erhi-ponto sur la Ĉengdu-Ĉongking-a Fervojo





Skiza mapo de la Ĉengdu-Ĉongking-a Fervojo

kaj vilaĝoj vivis tre mizere. Konstrui fervojon estis la deziro de la siĉuan-aj popolanoj de multaj jaroj.

Por efektivigi tiun deziron, la siĉuan-aj popolanoj kondukis longtempan batalon. Sed, de feŭdaj regantoj de King-dinastio ĝis la kuomintanga reakciularo ĉiuj faris al la popolanoj nur subpremadon kaj ĉantaĝon. Kun la preteksto konstrui fervojon, ili devigis la popolanojn pagi pezajn impostojn. La dokumento diris: Dum la regado de la kuomintanga reakciularo, la siĉuan-aj popolanoj devis pagi "imposton por konstruo de fervojo" ĝis la jaro 1991. La grandega monsumo de la popolanoj eniris en la monujojn de la regantoj kaj politikistaĉoj, dum la t.n. Ĉengdu-Ĉongking-a Fervojo restis nur punktolinio sur la mapo.

La Partio kaj Prezidanto Maŭ tre zorgas la siĉuan-ajn popolanojn kaj tiean konstruadon. Nur duonjaron post la Liberiĝo de Siĉuan-provinco, Prezidanto Maŭ jam elmetis alvokon pri konstruo de la Ĉengdu-Ĉongking-a Fervojo. Tuj bolis la siĉuan-aj popolanoj. Rapide organiziĝis vojkonstrua armeo kun pli ol 100,000 personoj. Post entombigo de la reĝimo de Ĉiang Kajŝek, 28,000 komandantoj kaj batalantoj de la popola liberiga armeo tuj sin ĵetis kiel pioniroj en la konstruadon de la fervojo eĉ ne havante tempon por forigi la militiran polvon de sia korpo. En la 15-a de junio, 1950, la konstruado de la Ĉengdu-Ĉongking-a Fervojo oficiale komenciĝis.



Tiam, nia lando ankoraŭ troviĝis en la periodo de ekonomia restariĝo kaj alfrontis diversajn malfacilojn en financo. La armeaj kaj popolaj laborantoj sinforgese penlaboris sur la vojo kun ŝpato, ŝtala borstango kaj martelo en la manoj, ne konsiderante pri tempo, rekompenco kaj kondiĉoj. Ne estis ŝpaloj, la laborantaj popolanoj ambaŭflanke de la vojlinio levis ardan tajdon kontribue vendi ŝpalojn al la ŝtato. Ili iris profunde en montojn kaj densajn arbarojn por haki arbojn spite de frosta vintro kaj varma somero, kaj iuj malriĉkamparanoj eĉ vendis sian trezoran nanmu-arbojn kaj kamfor-arbojn. La pli ol 1,000,000 ŝpaloj bezonataj por la tuta konstruaĵo estis transportitaj al la konstruejoj antaŭtempe. Mankis reloj, la laboristoj kaj oficistoj de la Ĉongking-a Fera-ŝtala Kompanio rekonstruis fabrikon sur la ruinaĵo de fabriko detruita de la kuomintanga reakciularo, riparis difektitan laminatilon faritan antaŭ 60 jaroj, venkis multajn malfacilojn kaj ĝustatempe ellaminatis nombrojn da bonkvalitaj reloj, kiuj kontentigis la bezonon de la konstruado. La vojkonstruaj popolanoj kaj teknikistoj hakis montojn kaj formovis sume pli ol 28,000,000 kubmetrojn da tero kaj ŝtonoj por plenigi profundan ravinon de Guazija. Ili konstruis ferponton super la rivero Tuogiang kaj pli ol 1,000 pontojn kaj kulvertojn sur la tuta vojlinio per lokaj materialoj. Dank' al tio, la konstruado grandpaŝe antaŭenmarŝis kaj je la l-a de julio de 1952, la tuta vojo estis sukcese konstruita. La Ĉengdu-Ĉongking-a Fervojo, kies "konstruado" daŭris dekojn da jaroj en la malnova socio sen meto de eĉ unu colo da relo, estas finkonstruita kaj malfermita al trafikado nur en du jaroj. La liberigita ĉina popolo skribis la novan paĝon en la historio de la fervoja konstruado de Ĉinio.

FELIĈO FLORAS EN URBOJ KAJ KAMPARO

La finkonstruo de la Ĉengdu-Ĉongking-a Fervojo rapide ŝanĝas la fizionomion de meza Siĉuan.

Ĉengdu, urbo kun historio de pli ol 2,000 jaroj, estis tre postiĝinta konsuma urbo antaŭ la Liberiĝo. Pro malfacileco de trafiko, la provizo de industriaj materialoj estis tre malfacila. La prezo de unu tuno da karbo en Jongĉuan estis 15 juanoj, tamen tiu de la karbo transportita al Ĉengdu estis 80 juanoj. Krom kelkaj forĝejoj por riparado en la tuta urbo estis nur kelkaj malgrandaj fabrikoj. Post la Liberiĝo, Ĉengdu komencis sian novan vivon, la Ĉengdu-Ĉongking-a Fervojo kreis favorajn kondiĉojn por la disvolviĝo de la industria kaj agrikultura produktado, kaj la urbo Ĉengdu konstruiĝis iom post iom en novan industrian bazon de metalurgia, maŝinfabrika, kemia kaj malpeza industrioj.

En monturbo Ĉongking kvankam troviĝis kelkaj industriaj entreprenoj en la malnova Ĉinio, tamen

Tuogiang-ponto



Kamionoj en transporto

ili estis tre postiĝintaj. Ni prenu la Ĉongking-an Feran-ŝtalan Kompanion kiel ekzemplon. Tiam, ĝiaj ekipaĵoj estis malnovaj, ŝarĝado kaj malŝarĝado estis faritaj per homa forto kaj transportado per lignoŝipoj, la kvanto de ĝiaj produktaĵoj estis malalta kaj la kvalito estis malbona. Post la Liberiĝo, la laborista klaso fariĝis ĝia mastro, kaj la kompanio rapide restariĝis. Dank' al la finkonstruo de la Ĉengdu-Ĉongking-a Fervojo, vagonaro povas veturi rekte en la fabrikon, efektiviĝis mekanika ŝarĝado kaj malŝarĝado, senĉese disvolviĝis ĝia produktado kaj ĝi iom post iom fariĝis mezgranda fera-ŝtala kombinumo. Nun la jara produktokvanto de nur unu malgranda martin-forna laborejo jam egalas al 9-oblo de tiu de la kompanio en dek jaroj antaŭ la Liberiĝo, la specoj kaj varioj de ŝtalo plimultiĝis je pli-ol-200-oblo, kaj ĝi ankaŭ fabrikis multajn specojn de bonkvalitaj alojaj ŝtaloj kun ultraalta rezisteco kontraŭ tiro, kaj eltenemo kontraŭ varmo kaj premo, kaj per ili subtenis la disvolviĝon de la nacia ekonomio. Ĉongking fariĝis grava industria kaj komerca urbo en sudokcidenta Ĉinio.

Nejgiang estas la meza stacio sur la Ĉengdu-Ĉongking-a Fervojo, kaj kromnomata kiel "dolĉa urbo" pro ĝia abunda produkto de sukerkanoj. Tamen antaŭ la Liberiĝo, la tieaj laborantaj popolanoj ne aĉetis sukeron pro manko de mono kaj la sukero ne povis esti transportita aliloken pro malfacila trafiko. Tial fermiĝis sukerfabrikoj kaj sukerkan-kamparanoj ne povis sin vivteni. Post la Liberiĝo, sukerkan-kamparanoj aktive plibonigis la kulturmanieron de sukerkanoj kaj disvastigis ĝian plantareon, kaj la fervojo transportis al ili novtipajn agrikulturajn instrumentojn kaj kemian sterkon, tial ĝia produktokvanto multe plialtiĝis, kaj Nejgiang fariĝis centro de sukera industrio de Siĉuan. Kun la disvolviĝo de sukera industrio, ĉe la regiono de Nejgiang kun la Ĉengdu-Ĉongking-a Fervojo kiel la trunko konstruiĝis 194 longaj kaj mallongaj ŝoseoj kun totala longeco de pli ol 4,400 kilometroj, kiuj formis trafikan reton kaj fortege stimulis la produktadon de industrio kaj agrikulturo.

Por disvolvi agrikulturan produktadon la fervojaj laboristoj kaj oficistoj ĉiel klopodis por transporti al la vasta kamparo novtipajn agrikulturajn instrumentojn, drenajn kaj irigaciajn ekipaĵojn, kemian sterkon, bonajn semojn, porplugajn bovojn, bonspeciajn porkojn kaj fiŝidojn . . . La fervojo manifestis sian gigantan povon en reformado de la naturo kaj gajno de riĉaj rikoltoj de agrikulturo en dek sinsekvaj jaroj. Abundas akvaj riĉfontoj en Gianggin-gubernio en monteta regiono. La popolanoj de la gubernio energie faris agrikulturan akvoutiligon kaj disvolvis hidroelektran aferon. Kaj per ŝtalaĵoj, cemento, dinamito, hidraŭlikaj turbinoj, generatoroj, elektraj motoroj kaj aliaj ekipaĵoj ĝustatempe transportitaj de la fervojo, ili konstruis 155 akvorezervejojn, pli ol 13,000 malgrandajn montajn aŭ valajn akvorezervujojn, 572 ŝtonajn riverbaraĵojn kaj 19 malgrandajn hidroelektrejojn, tiel ke la kampoj fariĝis stabile altproduktaj kaj riĉa rikolto estas akirita ĉiujare. En la pasinta jaro, Nejgiang-subprovinco renkontis sekegecon maloftan en la lastaj preskaŭ 40 jaroj. Vagonaro ĝustatempe transportis tien materialojn por batalo kontraŭ sekegeco, kaj la tuta subprovinco koncentris irigaciajn ekipaĵojn kaj batalis kontraŭ sekegeco tutajn 10 monatojn, kaj fine gajnis riĉan rikolton en la tuta subprovinco. La totala produktokvanto de greno plimultiĝis je pli ol 150,000 tunoj ol tiu de 1970, la rekorda jaro en la historio, kaj ankaŭ la jaraj produktkvantoj de kolzo, tabako, silko kaj porkoj ĉiuj rompis la rekordojn en la historio, kaj la enspezo de la komunumanoj je 10.2 pocentoj plimultiĝis ol tiu de la jaro 1970.

ANTAŬENMARŜAS LA POPOLA FERVOJO

Kun la rapida disvolviĝo de la industria kaj agrikultura produktado kaj naciekonomia konstruado, ĉiam plimultiĝantaj diversspecaj agrikulturaj, flankokupaj kaj lokaj produktaĵoj koncentriĝas ĉe la Ĉengdu-Ĉongking-a Fervojo por esti transportataj, kaj rapide kreskas ankaŭ la kvanto de la transportendaj produktaĵoj kaj bezonataj krudaj materialoj, hejtaĵoj kaj ekipaĵoj de diversaj fabrikoj, minejoj kaj aliaj entreprenoj de fero kaj ŝtalo, karbo, maŝinoj, elektro kaj kemiaj sterkoj.

La prosperiĝo de la socialisma produktado kaj konstruado kuraĝigas la laboristojn kaj oficistojn de la Ĉengdu-Ĉongking-a Fervojo. La lokomotivaj laborgrupoj elmetis por si la devizon: "Ni preferas ŝviti multe ol lasi materialojn longe atendi en la stacioj." Ili aktive disvolvis socialisman konkurson por kiel eble plej rapide kaj multe transporti varojn kaj kreis rekordojn unu post alia.

Disvolvante la spiriton de sinapogo sur propraj fortoj, la laboristoj kaj oficistoj de la fervojo faris teknikajn renovigon kaj revolucion. En Giulongpostacio, malpli ol 10 kilometrojn fore de Ĉongkingstacio, ŝarĝado kaj malŝarĝado estis faritaj ĉefe per homforto ĉe la komenco. Grandega estis la labora intenseco sed tre malalta estis la efiko. Portisto Tang Joŭŝan kaj liaj kunuloj kune kun teknikistoj fabrikis pordajn levmaŝinojn kun levpovo de 10 ĝis 20 tunoj kaj aliajn ekipaĵojn. Krome la ŝtato donis al ili grandajn mekanikajn ekipaĵojn, kaj dank' al tio nun la stacio jam fundamente efektivigis mekanikigon de ŝarĝado kaj malŝarĝado. La siatempa transportisto Tang Joŭŝan fariĝis estro de la taĉmento de mekanika ŝarĝado kaj malŝarĝado. En la pasintaj dudek jaroj, la fervojaj laboristoj kaj oficistoj kondukis grandan kvanton da teknikaj reformoj, renovigis komunikajn ekipaĵojn, malgrandigis kurbiĝojn de la vojo, malkrutigis deklivojn kaj ŝanĝis la malnovajn relojn per novtipaj en la tuta vojlinio. Ĉio ĉi tio altigis la efikon de la Ĉengdu-Ĉongking-a Fervojo kaj nun la efektiva jara transporta kvanto jam 1.5-oble superis normon planitan.

Ligite kun la fervoja reto de la tuta lando norde per la Baŭgi-Ĉengdu-a Fervojo kaj la Lanĝoŭ-Lianjungang-a Fervojo, sude per la Siĉuan-Gujĝoŭ-a Fervojo kaj la Hunan-Guanghi-a Fervojo, la Ĉengdu-Ĉongking-a Fervojo nun pli bone servas al la socialisma konstruado de Siĉuan-provinco kaj la patrolando.

Nokto de la Ĉongking-a Stacio



La Geologia Afero de Ĉinio

DISVOLVANTE la revolucian spiriton de sinapogo sur propraj fortoj kaj penema luktado en malfaciloj, niaj geologiaj laborantoj vizitis sennombrajn montojn kaj riverojn de la patrolando, spite al neĝblovo kaj terura varmego, kaj liveris grandan kvanton da materialoj pri mineralaj fontoj, hidrogeologio kaj inĝeniera geologio kaj estas honoraj kiel pioniroj de la ekonomia konstruado.

En la malnova Ĉinio, sub la longa regado de la kuomintanga reakciularo tre postiĝinta estis nia industrio kaj ankoraŭ pli subevoluinta nia geologia laboro. En 1949 antaŭ la Liberiĝo, en nia tuta lando troviĝis nur centoj da geologiaj laborantoj kaj 14 malnovaj bormaŝinoj. En preskaŭ duonjarcento oni esplore enboris sume nur 170,000 metrojn kaj esploris 18 specojn da mineraloj. Nun

La kamparano informas sian trovon pri mineralo.

niaj geologiaj laborantoj faris ĝeneralan prospektoradon al tero kun areo de milionoj da kvadrataj kilometroj kaj enboris dekojn da milionoj da metroj. Ĝis la fino de 1971 la nombro de la geologiaj laborantoj de la tuta lando pliiĝis je du trionoj kompare kun tiu en 1957 kaj je kelkcentoblo ol tiu antaŭ la Liberiĝo. Ni jam trovis en nia lando ĉiun el la pli ol 140 specoj de mineraloj konataj en la mondo. Nun oni jam fundamente plenumis esploradon pri la rezervaj kvantoj de volframo, stano, molibdeno, antimono, zinko, mangano, plumbo, aluminio, karbo, fero, kupro, sulfuro, fosforo kaj aliaj minoj. Oni ne nur plenumis esploradon pri grandaj mineralaj litoj por grandaj feraj kaj ŝtalaj bazoj de nia lando kiaj tiuj de Anŝan, Baŭtoŭ kaj Vuhan, sed ankaŭ trovis multajn minojn por diverslokaj mezgrandaj kaj malgrandaj feraj kaj ŝtalaj bazoj. Precipe oni prospektoris multspecajn gravajn mineralajn fontojn en internaj regionoj de nia lando, kiuj liveras solidan materian bazon por fondi sendependan kaj kompletan industrian sistemon kaj akcelas la socialisman konstuadon en internaj regionoj de nia lando.

Kun disvolviĝo de produkta praktiko, pli kaj pli leviĝas la teoria nivelo de nia geologia scienco. La teorio pri geologia mekaniko kreita de niaj geologiaj laborantoj en la praktiko estas aplikita rekte en direktado pri la ĝenerala prospektorado. La trovo de grandaj olekampoj estas elstara ekzemplo pri tio.

En la pasinteco imperiistoj kreis absurdan teorion pri "malabundeco de petrolo en Ĉinio". Tamen la ĉinaj geologiaj laborantoj, post profunda esplorado, trovis en 1959 Daking-petrolkampon, la unuan grandan petrolkampon de nia lando kaj ekkonis la leĝojn de formiĝo, koncentriĝo kaj rezervo de petrolo. Poste aliaj novaj petrolkampoj estis trovitaj unu post alia.

Karbo estas ĉefa materialo por fandado de fero kaj ŝtalo. Sub direktado de la instrukcio de Prezidanto Maŭ "**ekspluati minojn**", ĝis la fino de 1971 ĉiuj provincoj, urboj rekte sub la centra registaro kaj aŭtonomaj regionoj de nia lando trovis karbominojn. De longa tempo, karbo uzata de kelkaj provincoj sude de Jangzi-rivero de nia lando devis esti transportata de la nordo. En la lastaj jaroj, post malfacila kaj detala esplorado niaj geologiaj laborantoj fine trovis riĉajn karbofontojn en iuj regionoj sude de Jangzi-rivero, kie troviĝas multaj erupciaj rokoj. Nun la provincoj sude de Jangzi-rivero klopodas por fini la staton de dependo de la nordo en karboprovizo.

Membroj de la 15-a geologia taĉmento de Kinghaj kolektas mineralajn specimenojn sur la kruta roko alta je pli ol 6,000 metroj super la marnivelo.

En la pasinteco iuj okcidentaj geologiaj "specialistoj" kaj "aŭtoritatuloj" asertis, ke "sub la ruĝa tertavolo de Gianghi ne estas minoj". En la lastaj jaroj, post prospektorado de kelkaj monatoj la laboristoj kaj oficistoj de la 909-a Geologia Taĉmento de Gianghi-provinco trovis grandan salminon, kies rezerva kvanto sufiĉas por uzo de loĝantoj de Gianghi en miloj da jaroj, kaj kuprozan minejon. Sub alia ruĝa tertavolo ili trovis minon de bonkvalita bitumkarbo. Krome, ankaŭ disvolviĝas margeologia laboro de nia lando. En la plej granda industria urbo de nia lando Ŝanhajo oni fundamente solvis la malfacilan problemon de malleviĝo de grundo de la urbo. En la malnova Ĉinio, ne troviĝis industrio de geologiaj maŝinoj kaj aparatoj. Post la Liberiĝo ĝi pli kaj pli disvolviĝas. Ankaŭ la geologiaj scienco kaj tekniko progresas tagon post tago.

Gvidanto, teknikisto kaj laboristoj de la geologia eksperimentejo de Gianghi kune studas projekton.

Nia geologia afero akiris rimarkindan sukceson en servado al agrikulturo. En la pasintaj 23 jaroj, la geologiaj laborantoj trovis subteran akvon, fosforon, kalion kaj aliajn kemisterkajn fontojn en regionoj, kie mankas akvo kaj sterko. En provincoj, urboj rekte sub la centra registaro kaj aŭtonomaj regionoj de nia nordo oni trovis riĉan subteran akvon en areo de pli ol 100,000 kvadrataj kilometroj. De la periodo de 1966 ĝis 1970 oni jam fosis en la provincoj Hebej, Ŝandong kaj Henan sole centmilojn da putoj, kiuj estas preskaŭ 5-oblo de tiuj antaŭ la Granda Proletara Kultura Revolucio.

Niaj geologiaj laborantoj donis grandan atenton al kombinado de profesiaj geologiaj laborantoj kun la vastaj amasoj en serĉado kaj informado de ercoj. La vastaj amasoj rigardas tiun laboron kiel nerifuzeblan devon por subteni la socialisman konstruadon. Ili tre bone konas la historion kaj nunan staton de la montoj, riveroj, grundo kaj ŝtonoj de siaj lokoj kaj akumulis en longtempa produktado riĉajn spertojn en serĉado kaj konado de ercoj. Ekzemple, informiĝinte, ke geologia taĉmento serĉas ercojn en lia hejmloko, iu pli-ol-70-jara malriĉkamparano de Gianghi ekmemoris, ke li vidis specon de erco en iu loko antaŭ pli ol 20 jaroj. Li do persone kondukis la geologian taĉmenton al tiu loko transgrimpinte multajn montojn kaj tie trovis nemetalan mineral-punkton kun certa grandeco. Laŭ statistiko, de 1970 amasoj de nia lando informis dekmilojn da novaj mineral-punktoj.



LU ŜUJHJUAN:

Novaj Sukcesoj en Akvoutiliga Konstruado de Ŝandong-provinco

ŜANDONG-PROVINCO situas en la orienta parto de nia lando, kie troviĝas kaj montetaroj kaj vasta ebenejo kaj interkruciĝantaj riveroj kaj lagoj. La fame konata Flava Rivero fluas tra la provinco en Bohaj-maron.

Post la Liberiĝo, sub la saĝa gvido de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio de Ĉinio, la popolo de Ŝandong surpaŝis iom post iom la larĝan socialisman vojon de kooperativigo kaj komunumigo. Laŭ la instrukcio de Prezidanto Maŭ ke "**akvoutiligo estas aorto de agrikulturo**", ili kondukis grandskalan akvoutiligan konstruadon por rearanĝi tieajn montojn kaj riverojn, sin apogante sur la propraj fortoj kaj luktante kontraŭ malfaciloj, tiel ke la fizionomio de Ŝandong-provinco tute noviĝis.

En la komenca periodo post la Liberiĝo, por kiel eble plej frue restarigi agrikulturan produkton kaj venki katastrofojn kaŭzitajn de pluvego kaj sekeco, Prezidanto Maŭ faris unun post alia la alvokojn: "**nepre jungu Huaj-riveron**", "**bone aranĝu aferon de la Flava Rivero**" kaj "**nepre jungu radikale Haj-riveron**". Varme respondante al tiuj alvokoj la Ŝandong-a popolo komencis batali por jungi Huaj-riveron en unuigita plano, kombiniĝo de rezervo kaj dreno de akvo kaj sinteza aranĝo de agrokulturado, forstumado kaj haltigo de grunda erozio.

Ekde la jaro 1949 la popolanoj de Linji-regiono komencis reformi la riverojn Ji kaj Ŝu kiuj estas branĉoj de Huaj-rivero. Sub la forta subteno de la ŝtato, sin apogante sur la kolektiva forto ili hakis montojn kaj en tri jaroj fosis kanalon kondukantan akvon de Ji-rivero al Ŝu-rivero kaj novan Ŝu-riveron, trapasantajn ŝtonajn montojn kun longeco de 100 kilometroj. Tiamaniere ili kreis la novajn fluejojn de la du riveroj al la maro kaj venke plenumis la unuan taskon. Post tio ili faris forstumadon en montregionoj de la supra kaj meza baseno de la du riveroj, konstruis lagojn kaj akvobaraĵojn por haltigi erozion kaj konstruis pli ol 40 grandajn kaj mezgrandajn akvorezervujojn kaj aron da malgrandaj akvorezervujoj por teni kaj dreni akvon. En ebenejo de la malsupra baseno ili konstruis digojn kaj kampojn terasajn kaj striajn kaj pli ol 60 grandajn kaj mezgrandajn irigaciajn konstruaĵojn, inkluzive de fosado de kanalo. Tiel, la miljaraj malutilaj riveroj estas enjungitaj, kaj rezulte de tio 332,000 hektaroj da kampoj ricevas irigaciadon. La plejparto de malaltaj kampoj facile inundeblaj en la basenoj de Ji- kaj Ŝu-riveroj fariĝis rizkampoj, kiuj similas al tiuj sude de Jangzi-rivero. Ni prenu Ligiaĝaj-brigadon kiel ekzemplon. Ĝiaj 5,000 muoj da malfekunda tero dislokiĝas sur montoj kaj inter la du riveroj. Antaŭ la Liberiĝo tie ofte okazis katastrofoj de inundo kaj sekeco, la produkto estis tiel postiĝinta, ke la pomua produktokvanto de

greno estis nur ĉirkaŭ 50 kilogramoj eĉ en jaro de abunda rikolto. Post la Liberiĝo, sin apogante sur la kolektiva forto ili faris per pioĉoj kaj vektoj monthakadon, grundotransformon, putofosadon, riverŝanĝon kaj forstumadon. En la pasintaj dek-kelkaj jaroj, por la konstruado oni uzis pli ol 2,100,000 labortagojn kaj preskaŭ 5 tunojn da feraj instrumentoj kaj transportis 6,250,000 kubmetrojn da ŝtono kaj tero, tiel ke 11 montodeklivoj estas komplete reformitaj, 5 akvorezervujoj kaj 31 lagoj kaj barajoj konstruitaj, ĉefa kanalo kun longeco de pli ol 19 kilometroj fosita kaj 12,800 muoj da montodeklivoj kaj riverbordoj forstumitaj. Nun en tiu brigado plene disvolviĝas agrikulturo, forstumado, brutobredado, flankokupoj kaj fiŝado. En 1971, la pomua produktokvanto de greno atingis 427 kilogramojn kaj la tuta brigado rezervis 200 tunojn da greno. Prezidanto Maŭ laŭdis la revolucian spiriton kaj la sukcesojn de tiu brigado, ke **"Ligiaĝaj-brigado estas bona ekzemplo en reformado de Ĉinio per la spirito de la translokigo fare de Malsaĝa Avo."**

La alia akvosistemo de Huaj-rivero en Ŝandong estas la sudaj kvar lagoj. En la pasinteco, anstataŭ ordigi ĝin, la regantoj de diversaj dinastioj kaj la kuomintanga reakciularo senbride detruis ĝin. En la jaro 1935, la Flava Rivero breĉis la digon, disfluis orienten trans la kvar lagojn en la suda parto kaj la Tiangin-Pukoŭ-an Fervojon, inundis pli ol 20 guberniojn de Ŝandong- kaj Giangsu-provincoj kun 400,000 hektaroj da tero. Post la Liberiĝo, tri ĉefaj riverlitoj estas dragitaj, du riveroj estas nove fositaj, kaj du kanaloj estas larĝigitaj, kio multe reduktis inundajn katastrofojn kaj kreis favorajn kondiĉojn por plena utiligo de la lagoj en disvolvo de agrikulturo, fiŝbredado kaj navigado.

La Partio kaj registaro tre zorgis pri la konstruado de Haj-rivero en norda Ŝandong kaj helpis ĝin per granda konstrua taĉmento ekipita per maŝinoj kiu kune kun tieaj konstruantoj batalis en 9 sinsekvaj jaroj kaj plenumis dragadon de la riveroj Tuhaj, Magia kaj Dehuj. Krome ili reordigis 52 riverlitojn, konstruis 31 kluzegojn kaj pli ol 1,400 pontojn

La inundellasa kluzo konstruita de la popolanoj ĉe la baseno de Huaj-rivero en Ŝandong

kaj kulvertojn. Pli ol 40,000,000 arboj estis plantitaj sur riverbordoj. Ĉiuj gubernioj, komunumoj kaj brigadoj en la riverbasenoj starigis multe da akvoutiligaj konstruaĵoj kaj aliajn kompletigajn konstruaĵojn por irigacio kaj drenado. Rimarkinde ŝanĝiĝis la natura fizionomio kaj produktaj kondiĉoj de norda Ŝandong-provinco. En 1971, kvankam tie pluvegis kontinue, tamen la inundita areo estis multe reduktita pro la akvoutiliga konstruado. Iuj malaltaj kampoj facile inunditaj en la pasinto fundamente ne estis trafitaj de katastrofo. La vastaj amasoj ĝoje diris: "Sur la fame konataj inundiĝemaj kampoj hodiaŭ bone kreskas plantaĵoj." Jangliuhjue-brigado de Binhian-gubernio, kiun oni antaŭe nomis malriĉa vilaĝo kun alkalaj kampoj, nun fariĝis elstara unuo de la tuta provinco pro tio, ke ĝia pomua produktokvanto de greno superis 500 kilogramojn kaj tiu de sensemigita kotono atingis pli ol 100 kilogramojn post pena akvoutiliga konstruado kaj reformado de grundo.

Ankaŭ la riverlitoj de la Flava Rivero kaj aliaj en Ŝandong-provinco estas reordigitaj. De pli ol dudek jaroj, ne okazis al la Flava Rivero digbreĉiĝo kaj superfluo dum printempa riverŝveliĝo aŭ aŭtuna pluvado.

En la historio, Ŝandong-provinco suferis ne nur de inundego, sed ankaŭ de serioza sekeco, precipe Kingŝi-montregiono, al kiu akvo estis tiel kara kiel oleo. Krom tio, en la malnova socio, tieaj loĝantoj ankaŭ suferis de ekspluatado kaj subpremado de la reakcia reganta klaso. Sur memorŝtono oriente de Hiju-vilaĝo de Vuging-komunumo, Linkju-gubernio troviĝas jenaj vortoj: "En la jaro 1616, pro sekegeco tie kreskis nenia plantaĵo, velkis arboj, ĉie flugis akrididoj. Maljunuloj kaj malfortuloj vagadis en profundaj valoj, plenaĝuloj forfuĝis aliloken, geknaboj estis venditaj al aliaj provincoj, invalidoj sin manĝis unu alian. 70-80% de la loĝantoj forfuĝis kaj nur 20-30% postvivis, tial tie vidiĝis tre malmulte da homoj." Tio estas historia atesto kaj priskribo pri la mizera vivo de la laboranta popolo en la malnova socio.

Sed, tia vivo forpasis por ĉiam. Post la Liberiĝo, la laboranta popolo mem direktas sian sorton.

La diligentaj komunumanoj de Ligiaĝaj de Gjunan-gubernio gajnis sinsekvajn riĉrikoltojn de greno kaj arakido.

Komunumanoj de Hivang-brigado de Liaŭĉeng-gubernio rikoltas kotonon.

Krom multaj kontraŭ-inundaj kaj akvodrenaj konstruaĵoj, ili konstruis ankaŭ kanalojn por irigacio kaj putojn por trinkakvo. Precipe en la jaro 1958, sub kuraĝigo de la ĝenerala linio "**Streĉi plene la energion kaj strebi forte antaŭen por multe, rapide, bone kaj ekonomie konstrui socialismon**", ellaborita de Prezidanto Maŭ, la popolo de Ŝandong-provinco pliapaŝe levis altan tajdon de akvoutiliga konstruado por venki sekegecon kaj akvostagnecon. Por plene utiligi sur- kaj sub-terajn akvojn, ili konstruis ŝtonajn kaj pumpmaŝinajn putojn kaj starigis multajn akvorezervujojn kaj akvoenkondukilojn. En la pasintaj dekkelkaj jaroj, ili ordigis pli ol 100 riverojn kaj riveretojn, kaj konstruis pli ol 700 grandajn, mezgrandajn kaj malgrandajn akvorezervujojn en la montregiono, kiu okupas 1/3 de la totala areo de Ŝandong-provinco. Krome, ili fosis pli ol 2,210,000 putojn, inter kiuj 210,000 estas pumpmaŝinaj, kaj konstruis pli ol 15,000 pumpstaciojn. La areo de irigaciataj kampoj kreskis ĝis pli ol 40,000,000 muoj, t.e. je pli-ol-11-oblo pli multa ol antaŭ la Liberiĝo.

En la pasintaj pli ol 20 jaroj, por la akvoutiliga konstruado de Ŝandong-provinco la ŝtato investis miliardojn da juanoj. Sub la forta subteno de la ŝtato kaj per sia pena luktado Ŝandong-aj popolanoj akiris ĝojindajn atingojn en la akvoutiliga konstruado. La minacoj de sekegeco, akvostagneco, inundo kaj alkalozo estas multe reduktitaj. Tio ja akcelis la disvolviĝon de agrikulturo, forstumado, brutobredado, flankokupoj kaj fiŝado, tiel ke la agrikulturo de la tuta provinco akiris riĉajn rikoltojn en dek sinsekvaj jaroj, kaj la grena produktokvanto altiĝis jaron post jaro. Nuntempe la pomua produktokvanto de 27 gubernioj kaj kelkcent komunumoj de la tuta provinco superis 250 kilogramojn. Kun la produkta disvolviĝo, multe leviĝis la vivnivelo de la laboranta popolo.

Akvedukto longa 300 metrojn konstruita de la popolanoj de Fejhian-gubernio de Ŝandong



Vendistoj ĝustatempe enkestigas la maŝinpartojn por poŝte sendi ilin al la uzantoj.

Fabriko Bonvena al Kamparanoj

LU VEJ

LA motora fabriko de Lajjang estis malgranda feraĵa fabriko, starigita de la armeo kaj popolo de la kontraŭjapana bazloko en la orienta Ŝandong-provinco en la produkta kampanjo de 1943. En la militaj jaroj ĝi produktis ne nur minojn kaj grenadojn, sed ankaŭ kotonsensemigilojn, teksilojn kaj malgrandajn agrikulturajn instrumentojn. Post la Liberiĝo ĝi daŭre servas al la agrikultura produkto per fabrikado de norioj kaj novtipaj agrikulturaj instrumentoj. Ekde la jaro 1953 ĝi komencis produkti dizelojn. Dum la lastaj dekkelkaj jaroj tiu fabriko jam provizis la kamparon per dizeloj kun 800,000 ĉevalpovoj kaj faris kontribuon al la agrikultura mekanikigo.

PRODUKTI MALKARAJN KAJ BONKVALITAJN DIZELOJN POR KAMPARO

Foje, du komunumanoj alportis per ĉaro dizelon al la fabriko por riparo. La revolucia komitato de la fabriko tuj prenis tiun aferon kiel ekzemplon por fari edukon, por ke la laboristoj konu la malfacilojn kaŭzitajn de la malbonkvalitaj produktaĵoj al kamparanoj en la produktado. La laboristoj kaj oficistoj komprenis, ke la rilato inter la socialismaj fabrikoj kaj kamparanoj estas ne tiu de negoco, sed de reciproka subtenado. Se nur la fabriko senĉese plibonigas kvaliton de siaj produktaĵoj, ĝi povas efektive servi al la agrikultura mekanikigo. Iufoje, la laborejo por muntado ekzamenis nove produktitan dizelon kaj rimarkis, ke ĝi ŝprucigis fumon kaj fajron dum gasa ellasado. Laŭ la teknologia normo, la dizelo povas esti liverata al uzo, ĉar ĝiaj ĉevalpovo kaj olekonsuma kvanto jam atingis la difinitajn postulojn. Tamen, la laboristoj pensis, ke tio ne nur malpliigas produktivecon de la maŝino, sed ankaŭ mallongigas ĝian uzadon, se la problemo pri fumlaso kaj fajroŝpruco ne estas solvita. Ili decidis ne liveri al la klientoj tiajn produktaĵojn kaj organizis fortojn por ĝin plibonigi. Post ripetada esplorado ili renovigis iun maŝinparton kaj tiel solvis la problemon. Samtempe ili malmuntis 800 tiajn dizelojn transportotajn al aliaj lokoj por ansta-

La sekretario de la partia komitato de la fabriko kaj gelaboristoj kune studas kiel altigi kvaliton de dizelo.

taŭigi la malnovan maŝinparton per la nova kaj nur tiam liveris ilin al la kamparanoj.

En la pasinteco la fabriko faris provfunkciadon de maŝinoj sub la normalaj kondiĉoj en la laborejo. Tiel ekzamenitaj maŝinoj ofte ne povis adaptiĝi al eksterordinaraj naturaj kondiĉoj. Sed nun ĝi provfunkciigas novtipan dizelon ne nur en la laborejo, sed ankaŭ ĉefe sur kampo. Subtenate de la koncernaj unuoj, tiu fabriko starigis dekkelkajn punktojn en malsamaj regionoj de la provinco por ekzameni la kvaliton kaj strukturon de la dizelo. Poste, laŭ opinioj de uzantoj, ĝi efektivigis pli ol dudek gravajn renovigojn al projektado, materialoj kaj teknologio de la dizelo kaj altigis ĝian adaptiĝecon al diversaj naturaj kondiĉoj de malsamaj regionoj.

Samtempe kun la plibonigo de kvalito de produktaĵoj, tiu fabriko disvolvis ŝparan movadon por malaltigi memkoston de produktaĵoj. La laboristoj kolektis forĵetitajn materialojn kaj konservis ilin por bezono de ĉiuj laborejoj en la teknika renovigo. Krome, laboristoj kolektis eluzitaĵojn kaj prilaboris ilin en malgrandajn maŝinpartojn. Antaŭe la forĝa laborejo faris 11 specojn de malgrandaj maŝinpartoj el kompletaj ferplatoj, sed nun ĝi faras tiujn maŝinpartojn per forlasitaj materialoj. La gisa laborejo prilaboris senutilajn ferajojn en sintritan feron kaj tiamaniere ŝparis pli ol 400 tunojn da ŝtalo. Krome, la fabriko mobilizis amasojn por fari teknikan renovigon, altigi uzatecon de ekipaĵoj kaj laboran produktivecon kaj ĉiurimede redukti neproduktan elspezon, rezulte de kio la memkosto de dizeloj malleviĝis jaron post jaro. Nun oni povas aĉeti du dizelojn per la sama sumo da mono por unu dizelo en la jaro 1967.

SUBTENI AGRIKULTURON ESTAS NIA DEVO

Foje, iu komunumano venis al la fabriko por aĉeti olebekon de dizelo, kaj ĝia vendisto klarigis al li, ke olepumpiloj kaj olebekoj estas produktitaj

de la kunlaboraj fabrikoj, kiuj provizas la fabrikon laŭ la interkonsentita kvanto, kaj ke se ĝi vendus al li unu olebekon, do unu dizelo ne povus esti muntita. Tiu komunumano diris: "Nun ni batalas kontraŭ sekegeco, sed sen olebeko la dizelo ne povas funkcii. Ĉu tio ne egalas al manko de unu dizelo?" La vendisto opiniis liajn vortojn pravaj kaj vendis al li unu olebekon post interkonsiliĝo kun la revolucia komitato de la fabriko. Tiu afero profunde komprenigis al la laboristoj kaj oficistoj, ke se oni produktas nur ĉefajn maŝinpartojn, sed ne akcesoraĵojn, do la vendita dizelo ne povas funkcii, kiam al ĝi difektiĝas unu aŭ du maŝinpartoj. Poste, venkinte multajn malfacilojn, ili starigis laborejon de olepumpiloj kaj olebekoj kaj produktis koncernajn akcesoraĵojn. La fabriko ankaŭ plimultigis la menditan kvanton de iuj maŝinpartoj. En la jaroj de 1970 kaj 1971, ĝi ne nur plenumis la taskon asignitan de la ŝtato produkti pli ol 70,000 maŝinpartojn, sed ankaŭ provizis agrikulturan produktadon per pli ol 160,000 maŝinpartoj.

Por pli bone servi al agrikulturo ili senĉese plibonigis sian laboron laŭ la bezono de la agrikultura produkto. Iutage komunumano de alia gubernio alvenis por aĉeti V-rimenon. La revolucia komitato de la fabriko serioze pristudis la aferon kaj decidis starigi fakon por poŝte sendi la menditajn maŝinpartojn al aĉetantoj. Post ricevo de letero aŭ telegramo sendita de produkta brigado pri mendado, la fabriko tuj sendis la menditaĵojn kaj la brigado poŝte pagas la monon laŭ la fakturo post ricevo de la varoj. Krome la fabriko ankoraŭ fondis riparan grupon, kiu ne nur faras tujan riparadon en la fabriko, sed ankaŭ sendas laboristojn al la kamparo por ekzameni kaj ripari maŝinojn dum okupata tempo de agrikulturaj laboroj aŭ batalo kontraŭ sekegeco kaj inundo, kaj per tio forte subtenis la agrikulturan produkton.

Laboristoj petas opiniojn de komunumanoj pri sia dizelo.

La Eduka Afero de Janbian en Prospera Disvolviĝo

LA Janbian-a Kore-nacia Aŭtonoma Subprovinco sin trovas en Gilin-provinco de nia lando. Antaŭ la Liberiĝo, subpremate de la imperiismo, feŭdaj fortoj kaj burokrata kapitalismo, la janbian-aj popolanoj vivis en ekstrema mizero. Invadinte nian Nordorienton en 1931, la japana imperiismo, kun malica intenco neniigi la nacian konscion de la koreaj popolanoj por eterne ilin regadi, praktikis sklavigan edukon en la lernejoj, senigante ilin je la rajto uzi la korean lingvon kaj tirane devigante ilin alpreni japanajn nomojn. Post la Liberiĝo, sub la zorgo de la Partio kaj Prezidanto Maŭ, la kultura kaj eduka afero de Janbian rapide disvolviĝis. En la jaro 1958, la tuta subprovinco jam ĝeneraligis elementan edukon, 97.9 % de la lernaĝaj infanoj estis en lernejoj. Nun oni ĝeneraligas edukon de malsupera mezlernejo en la kamparo kaj tiun de supera mezlernejo en la urboj. En 1949, fondiĝis la unua sinteza universitato en Janbian—la Janbian-a Universitato. En 1958, gvidate de la tri ruĝaj flagoj de la ĝenerala linio, antaŭensaltego kaj popola komunumo, kaj kun la vigla disvolviĝo de la eduka afero, la Janbian-a Medicina Instituto kaj la Janbian-a Agronomia Instituto



En iu kore-nacieca lernejo de Jangi oni faras instruadon per la korea lingvo.

La studentoj de la Janbian-a Universitato faras praktikon en manipulado de elektronaj aparatoj post la kurso.

fondiĝis respektive sur la bazo de la medicina kaj agronomia fakultatoj de la universitato. En la pasintaj pli ol 20 jaroj, la tri superaj lernejoj kulturis por la ŝtato grandan nombron da kore-naciaj kadroj kaj pli ol 7,000 diversajn specialistojn. Krome, multaj abiturientoj de superaj mezlernejoj estis senditaj al la Centra Nacia Instituto kaj aliaj superaj lernejoj por plua studo. En la lernejoj la koreaj instruistoj kaj lernantoj uzas la korean lingvon. La Janbian-a Eduka Eldonejo speciale eldonas diversajn lernolibrojn en la korea lingvo. En la tuta subprovinco, nun formiĝis kompleta eduka sistemo de elementaj, mezaj kaj superaj lernejoj por kulturi klerajn laborulojn kun socialisma konscio. La subprovinco nun havas 197 mezlernejojn kun pli ol 137,460 lernantoj, kies nombro estas 29-oblo de tiu antaŭ la Liberiĝo, kaj 1,471 elementajn lernejojn kun pli ol 302,000 lernantoj, kies nombro estas 4.2-oblo de tiu antaŭ la Liberiĝo.

La partia komitato de la aŭtonoma subprovinco prenas la ĝeneraligon de kampara eduko kiel ĉefan taskon en la edukaj laboroj. Post la kultura revolucio, ĉiu popola komunumo starigis sian mezlernejon kaj ĉiu produkta brigado fondis sian elementan lernejon, tiel ke nova prospereco de eduko aperis en la vasta kamparo. Laŭ la bezono de mekanikigo kaj scienca agrikulturado, Dongŝeng-komunumo de Jangi-gubernio establis agrikulturan lernejon en la jaro 1958, kaj de tiam pli ol 300 diplomitoj el la lernejo iris al komunumoj kaj produktaj brigadoj de la tuta gubernio. Nun ili plejparte laboras kiel veterinaroj kaj teknikistoj en kulturado de rizplantidoj, plantado, brutobredado, fruktoarba kulturado, agrikultura mekaniko kaj faris kontribuon al la disvolviĝo de agrikulturo kaj brutobredado de la gubernio.

Dum la ĝeneraligo kaj altigo de la lerneja eduko, ankaŭ la kontraŭanalfabeteca movado de la tuta subprovinco akiris rimarkindan sukceson. La fabrikoj, minejoj, kamparo kaj loĝkvartaloj starigis postlaborajn kontraŭanalfabetecajn lernejojn, dank' al kio la plejparto de la loĝantaro povas legi librojn kaj ĵurnalojn kaj skribi leterojn. Kore-nacia virino Huang Ŝunju, sekretario de la partia filio de la 9-a produkta grupo de Dongŝeng-brigado, Jangi-gubernio, neniam vizitis lernejon en la malnova socio. Post la Liberiĝo ŝi aktive komencis lernadon. Sin liberiginte de la analfabeteco, ŝi serioze studis verkojn de Prezidanto Maŭ, plurfoje tralegis la *Elektitajn Verkojn de Maŭ Zedong* en kvar volumoj kaj fariĝis aktivulo en studo de verkoj de Prezidanto Maŭ, fame konata tra la tuta Ĉinio. Ŝi estis glore titolita kiel klerulino en montaro. Maljuna laboristo Pan Ŝoŭseng de la Dunhua-a Arbara Buroo ne scipovis legi en la malnova socio. Post la Liberiĝo li soife sin klerigis, diligente lernis teknikon kaj kreis metodon de racia segado, kiu jam estis vaste aplikata kaj dank' al tio granda kvanto da ligno estas ŝparita por la ŝtato.

Krome, oni ankoraŭ starigis instruistan, hanlingvan, higienan kaj artan lernejojn, lernejon por financaj kaj komercaj kadroj kaj aliajn mezgradajn specialajn lernejojn en Janbian, kiuj kulturis dekmilon da instruistoj, kuracistoj, artistoj, kasistoj kaj libroteniistoj. La Janbian-a Arta Lernejo kulturis ankaŭ por ŝtataj ensembloj multajn eminentajn dancistojn kaj kantistojn.

Por ke la gefiloj de laboruloj povu viziti lernejojn, krom la ŝtato, ankaŭ fabrikoj, minejoj, komunumoj, produktaj brigadoj kaj loĝkvartaloj starigis diversajn lernejojn sin apogante sur la propraj fortoj. La Vugiazi-a produkta grupo de Ĉunjang-komunumo de Vangking-gubernio estas malfrekventata montvilaĝo kun pli ol 30 familioj, fore de la komunumo je 33 lioj kaj de la brigado je 15 lioj, kien la infanoj devis iri por viziti lernejon kaj iuj el ili ne povis ne rezigni lernadon pro la foreco. En la kultura revolucio, la komunumanoj mem starigis elementan lernejon en la vilaĝo, dank' al tio ĉiuj infanoj de la vilaĝo jam povas viziti la lernejon.

Dum donado de kulturaj lecionoj, la lernejoj organizis la lernantojn lerni industriajn, agrikulturajn kaj militajn aferojn kaj partopreni en klasa kaj produkta bataloj. La kultivejo kaj meteologia stacio starigitaj de la Ĉongŝan-a Elementa Lernejo de Helong-gubernio ne nur kombiniĝas kun instruado, sed ankaŭ rekte servas al la agrikultura produktado. Iun vesperon de la lasta aŭtuno, la komunumo okazigis amuzan vesperkunvenon kaj multaj komunumanoj iris rigardi artan prezentadon. Tiam la instruistoj kaj lernantoj de la meteologia grupo konstatis en observado, ke prujno aperos en tiu nokto, kaj tuj disaŭdigis tion al la komunumanoj. Aŭdinte la informon ili tuj rapidis al kampoj kaj rikoltis pli ol 7,500 kg. da tabakaj folioj. Post la noktomezo,efektive dika tavolo da prujno kovris la kampojn. Komunumanoj diris ĝoje: "Nur tia lernejo vere servas al nia bono!"

Instruistino de la Vejhong-a Elementa Lernejo de Jangi helpas geknabojn en ilia lernado.

La studentoj de la brutobreda fakultato de la Liming-a Labora Universitato de Dongŝeng-komunumo, Jangi-gubernio diagnozas la malsanan bovon sub direktado de la instruisto.



En la senĉesa disvolviĝo de la eduka afero, la diversnivelaj gvidantoj de la aŭtonoma subprovinco donis apartan atenton al kulturado de la instruistoj. La subprovinco starigis lernejon por altigi instruan kapablon de instruistoj, ankaŭ la gubernioj starigis similajn organizojn, kiuj ludis tre gravan rolon en altigo de instruado.

Nun, la urbo kaj gubernioj ellaboris, sub la gvido de la partiaj komitatoj, projekton pri ĝeneraligo de mezgrada eduko kaj la eduka afero de la subprovinco firmpaŝe disvolviĝas al pli alta stadio.

Amikeco Floras sur Stepo

MALDEKSTRE de Nengiang-rivero ĉe la piedo de la Granda Hing-an-montaro en Nordorienta Ĉinio sin trovas vasta stepo Vujuer, sur kiu loĝas agrikulturistoj kaj paŝtistoj de dahura, ĥalĥaza, olunĉuna, ovenkea, hana, manĉua, mongola kaj huja naciecoj. Sub la direktado de la nacia politiko de la Partio, ili kompakte unuiĝas kaj kune konstruas novan stepon. La sekvantaj rakontoj spegulas la unuiĝon de tiuj naciecoj.

KUNE KREI NOVAN BILDON

Ekster la vilaĝo de Dongtaha-brigado, kie koncentre loĝas dahuroj, aromo de rizfloroj ŝvebas super la vasta kamparo.

Tiu bela bildo estas kune kreita de diversnaciaj popolanoj. Samtempe kun la rapida disvolviĝo de brutobredado, la dahuraj komunumanoj de Dongtaha-brigado decidis energie disvolvi produktadon de greno por fari pli grandan kontribuon al la ŝtato. Ĉar ilia brigado sin trovas proksime de Nengiang-rivero, tial ili decidis krei rizkampojn sur la stepo kaj ilin irigacii per akvo de Nengiang-rivero. En frua printempo de nordorienta Ĉinio ankoraŭ ofte neĝas kaj la tero estas kovrata de glacio. Malgraŭ neĝblovado kaj frosto la komunumanoj vigle laboradis sur la stepo kun pioĉoj kaj ŝpatoj por konstrui akvokondukan sistemon. Ili finis la konstruadon surkampan en unu monato kaj poste komencis konstrui pumpstacion kaj inversan sifonan akvokondukilon, kiu devas transpasi riveron kun larĝeco de pli ol 100 metroj. Por ĝia konstruo oni devis movi grandan kvanton da terajo. Krome tiu tasko devis esti finita antaŭ la printempa ŝveliĝo de Nengiang-rivero, alie oni ne povis uzi la sistemon. Sed jam alproksimiĝis la printempa ŝveliĝo kaj estis vere malfacile por la brigado plenumi la konstruadon en ĝusta tempo.

En tiu ŝlosila momento, la partia komitato de la komunumo tuj sciigis al la tuta komunumo la malfacilojn renkontitajn de la komunumanoj de Dongtaha-brigado en konstruado de akvokonduka sistemo. La diversnaciaj komunumanoj diris unuanime, ke kuraĝeco kaj diligenteco de la dahuraj fratoj estas lerninda por ili kaj ili devas rigardi la malfacilojn de ili kiel siajn kaj labori kune kun ili por kreskigi rizon sur la stepo. Sekve ĉiuj brigadoj sendis laborulojn al Dongtaha-brigado por ĝin helpi.

Por konstrui inversan sifonon, antaŭ ĉio oni devis bari la riveron kaj fari konstruadon sur la riverfundo. Sub la gvido de la partia komitato de la komunumo, la diversnaciaj komunumanoj konstruis digon, formovis glacion, drenis akvon kaj forigis ŝlimon, kune ŝvitante kaj unuvoĉe kriante horuk! horuk! La neĝkovrita stepo plenis je arda atmosfero de kuna batalado de diversnaciaj popolanoj en unuiĝo.

En iu nokto kun muĝanta ventego la diversnaciaj konstruantoj informiĝis pri antaŭtempa alveno de printempa ŝveliĝo de Nengiang-rivero. Tio alportis al ili urĝan taskon: konstrui barajon sur Vuŝuang-rivero por garantii sekuran iradon de la konstruado de inversa sifono. En tiu alarma momento, Huang Zongking, la hana kadro de Hiaŭtun-brigado, vizitis Aŭ Hehi, kadron de Dongtaha-brigado kaj diris: "Ni nepre eltenu la provon kaj konstruu digon tuj en la nokto por bari inundakvon."

Aŭ Hehi respondis: "Vi jam penlaboradis la tutan tagon kaj devas iom ripozi en la nokto, do lasu al ni la urĝan taskon!"

Huang Zongking diris ridetante: "En la malnova socio, ni estis kunuloj en mizero kaj nun ni estas membroj de la sama komunumo. Ni ne devas streki dividlinion inter ni. Se necesas labori, ni laboru kune!" Tion dirinte, li tuj rapidis al la konstruejo kun hanaj komunumanoj.

La ventego muĝadis senĉese. Sed sur la konstruejo de inversa sifono la diversnaciaj komunumanoj kun lanterno en mano dorse portis pajlajn sakojn ŝarĝitajn de pezaj frostaj terbuloj al la mezo

de la riverlito por konstrui barajon. "Maljuna Huang kontuziĝis!" subite aŭdiĝis la krio. Alkuris al li komunumanoj. La vizaĝo de Huang Zongking estis vundita de terplena pajla sako. Oni haste bandaĝis lin. Huang Zongking diris: "Ne gravas mia vundo. Tuj iru konstrui la barajon, ni nepre devas ĝin finkonstrui antaŭ la veno de inundakvo!" Oni sukcesis fortiri lin de la konstruejo nur post longa klopodo.

Dank' al kuna batalado de la diversnaciaj komunumanoj, finfine konstruiĝis la akvokonduka sistemo kaj akvo de Nengiang-rivero fluis en la kampojn. Kiam ondadis rizplantoj sur la kamparo, dahuraj komunumanoj forte emociiĝis. Ili ĝoje ekludis kvarkordajn muzikilojn, dancis nacian dancon kaj prikantis la profundan amikecon inter la diversnaciaj popolanoj:

Maŭzedongpenso brilas super nia stepo,
la diversnacianoj kun interligitaj koroj
kreadas novan bildon en intima kunlaboro.
Ankoraŭ pli belege floras l' amikecaj floroj.
. . . . . .

KORO STRIKTE LIGIĜAS KUN KORO

Estis neĝblova vespero. Sur la stepa vojo kondukanta de Vugiazi-brigado de la Amikeca Komunumo, kie koncentre loĝas ĥalĥazoj, al la gubernia urbo iris ĥalĥaza maljunulo. De tempo al tempo li forviŝadis prujnon de sur siaj lipharoj kaj brovoj kaj atenteme esploradis la zumantajn telefonajn fadenojn tra la flirtantaj neĝflokoj.

La maljunulo nomiĝas Deju. Post kiam instaliĝis fadena disaŭdiga sistemo en tiu ĉi loko, li meminiciate prenis sur sin la taskon de linio-riparisto. Li pensis, ke tiu linio, per kiu oni povas kaj telefoni kaj disaŭdigi, ne nur interligas la ĥalĥazan vilaĝon, sed ankaŭ multajn vilaĝojn loĝatajn de hanoj, manĉuoj kaj dahuroj, ebligante al ili aŭdi radion el Pekino. Kun tiu penso li ofte iradis sur la stepo atente esplorante la linion por garantii ĝian normalan funkciadon. Iun vesperon, antaŭ komenciĝo de radiodisaŭdigo li rimarkis, ke neĝblovas. Timante ke la ventego rompos la elektran fadenon, li haste kontrolis kaj konstatis, ke la linio rompiĝis. Li prenis riparilaron kaj komencis kontroli la linion malgraŭ neĝblovado.

La neĝblovo pli kaj pli furioziĝis, kaj estis ĉiam pli mallume. Helpe de la lumo de elektrotorĉo en la mano li kontrolis la linion de pli ol 3 kilometroj kaj atingis la limon de lia sekcio, tamen li ne trovis la rompajon. Trans la limo sin trovas Haĉuan-brigado loĝata de hanoj kaj manĉuoj. Ĉu li haltu? Ne. Li pensis, ke la diversnaciaj popolanoj estas klasfratoj kaj devas prizorgi unu alian. Do li daŭrigis sian kontrolan iradon. Li kontrolis kaj kontrolis kaj trovis, ke la elektrofadeno rompiĝis de la ventego post la vilaĝo de Haĉuan-brigado. Li tuj kunigis la fadenon kaj poste ekgrimpis sur la stangon por denove fiksi ĝin sur la stangon. Sed en la frosta vintro, la stango estis tre glita. Kiam li atingis la mezon de la stango, li denove glitis malsupren. Li frapadis siajn piedojn, interfrotis la manojn kaj denove komencis grimpi kaj fine sukcesis atingi la supron. Li rapide fiksis la fadenon kaj poste glitis malsupren laŭ la stango. Sed ĉar liaj manoj sensentiĝis pro frosto, li subite falis sur la neĝkovritan teron kaj svenis.

Kiam Deju rekonsciiĝis, li trovis ke iu levis lin kaj paro da varmaj manegoj premis liajn manojn. Li atente rigardis la homon kaj rekonis en li hanan komunumanon Ĝang de Haĉuan-brigado. Kaj la lasta tuj klarigis antaŭ ol li ekparolis: "La furioza neĝblovo rompis la fadenon. Mi venis ĉi tien de 1.5 kilometroj malproksime en kontrolado kaj trovis ke vi kunigis la rompitan fadenon. Ni ja ŝuldas al vi multajn dankojn! Nu, mi dorse portu vin al via hejmo!"

Deju diris: "Garantii, ke la diversnaciaj popolanoj aŭdu voĉon el Pekino, ja estas nia devo. Tuj reiru, ĉar mi ja povas mem reiri al mia hejmo!" Tion dirinte, Deju obstine penis iri, sed liaj frostiĝintaj kruroj ne obeis lin. Ĝang tuj alpaŝis al li kaj subtenis lin iri malrapide.

Veninte al sia hejmo, Deju varme traktis lin kiel sian parencon. En la sekvanta mateno la megafono denove eksonis kaj la majesta muziko de "Ruĝas la Oriento" sonoris tra la aero super la vilaĝo sur la stepo. Aŭskultante la intiman sonon, Deju kaj Ĝang ekridetis feliĉe.

AMIKECO DE GENERACIO AL GENERACIO

Sur la stepo Vujuer, cirkulas inter la diversnaciaj popolanoj rakonto pri du dahuraj ruĝaj gvardianetoj, kiuj brave savis hanajn infanojn.

Estis tagmezo de la arda somero de la kuranta jaro. Jongde kaj Ĝanlin, la dahuraj ruĝaj gvardianetoj de la Elementa Lernejo de Dongtaha-brigado, ludis sur la Granda Barajo sur la stepo. Subite ili vidis, ke du infanoj kuris al la rivero sub la barajo por naĝado. Per la vestoj kaj babiloj, ili rekonis

en ili du hanajn infanojn. Jongde diris al Ĝanlin: "En la pasinta jaro oni elfosis ŝlimon el la rivero, tial en ĝi troviĝas profundaj kavoj. La hanaj infanoj ne scias tion. Ni ne devas lasi ilin enfali!" Ankaŭ Ĝanlin tion rimarkis kaj tuj diris: "Jes! Nia instruisto ofte diras al ni, ke la diversnaciaj samlernejanoj devas zorgi kaj helpi unu alian. Ni tuj atentigu ilin!" Tion dirinte, ili kuris al la rivero.

Kiam Jongde kaj Ĝanlin ankoraŭ estis centojn da metroj fore de la du hanaj infanoj, ili vidis ke la lastaj jam saltis en la akvon. Subite la infano kiu la unua saltis en la akvon komencis furioze svingi siajn manojn, jen subakviĝis, jen repuŝis sin supren kaj li ne povis krii pro englutado de akvo. Evidente li falis en kavon. Kaj baldaŭ ankaŭ la alia falis en kavon. En tiu kriza momento Jongde kaj Ĝanlin laŭte kriis preskaŭ samtempe: "Tuj ensaltu por ilin savi!"

Jongde deĵetis siajn vestojn kaj brue sin ĵetis en la riveron. Li naĝis rekte al la infano, kiu la unua falis en kavon. Kiam li alproksimiĝis al la loko, la hana infano jam malaperis. Li subakviĝis, serĉadis kaj baldaŭ trovis lin. La hana infano kaptis lian manon. Malgranda Jongde plenforte puŝis akvon per siaj piedoj, sin levis el la akvo kaj fine tiris la hanan infanon sur la bordon.

Dume Ĝanlin klopodis por savi la alian hanan infanon. Kiam Ĝanlin vidis, ke li sin puŝis el la akvo, li tuj provis lin tiri. Sed la infano firme ĉirkaŭbrakis lian kolon, tiel ke li glutis kelkajn plenbuŝojn da akvo. Li iom malpacienciĝis, faris fortan enspiron kaj sin puŝis al la bordo tirante kun si la infanon. Iom post iom li venis al malprofundejo kaj eldanĝerigis la infanon.

Novaĵo pri la okazaĵo baldaŭ diskoniĝis tra la vilaĝo. La organizo de la ruĝaj gvardianetoj de la lernejo okazigis kunvenon por laŭdi Ĝanlin kaj Jongde pro ilia revolucia heroismo manifestita en savo de la hanaj infanoj. Li Hiaŭdong, helpinstruanto de la ruĝaj gvardianetoj ripetade emfazis, ke oni devas bone memori la brilan instruon de Prezidanto Maŭ: **"La unuiĝo de la lando, la solidareco de la popolo kaj la solidareco de niaj diversaj nacioj — jen estas la fundamentaj garantioj por la nepra triumfo de nia afero."** La lernantoj, kiuj faris parolon en la kunveno, esprimis, ke ili lernos de Ĝanlin kaj Jongde por ke la solidareco inter la diversaj nacioj disvolviĝu kaj transdoniĝu de generacio al generacio, kaj ke la floro de solidareco kaj amikeco inter la diversaj nacioj sur la stepo floru pli kaj pli bele.

HJU ZENGĴONG:

"Brodado"

Kun verdaj rizplantidoj en la mano,
ni lernas "brodi" sur akvokamparo.
En la ŝtupkampoj kuras plant-kudriloj
kaj arĝentgaze ŝvebas la kanaloj.
Printempe verd-tapiŝoj mil brodiĝas
kaj en aŭtuno ondas vasta mar' de oro.
La komunumo belas kiel silkbrokato
kaj ĉie ĉarmas nova Daĝaj-floro.

Jaŭ-nacia Kadro

Lan Hajhong

EN la montaro de la Du-an-a Jaŭ-nacia Aŭtonoma Gubernio de Guanghi sin trovas popolkomunumo nomata "Tri Kaproj", kie loĝas jaŭ-aj, gŭang-aj, maŭnan-aj k.a. nacianoj. Antaŭ la Liberiĝo, por eskapi el kruela ekspluatado de montaj tiranoj kaj jaŭ-a ĉefo, la jaŭ-, ĝŭang- kaj maŭnan-nacianoj de la najbaraj gubernioj rifuĝis tien kaj vivtenis sin per primitiva terkulturo. La tiranoj kaj jaŭ-a ĉefo rimarkis, ke tie nenio estas ekspluatebla, ili do ordonis, ke la popolanoj ĉiujare liveru al ili tri sovaĝajn kaprojn kiel imposton. De tiam, la nomo "Tri Kaproj" simbolanta mizerecon cirkulis inter la popolanoj.

Tamen, hodiaŭ la "Tri Kaproj" jam ne plu estas malriĉa kaj postiĝinta loko. Respondante al la alvoko de Prezidanto Maŭ **"Lerni de Daĝaj en agrikulturo"**, la diversnaciaj popolanoj de la tuta komunumo pene luktis ses jarojn sin apogante sur la propraj fortoj, kaj akiris sinsekvajn riĉajn rikoltojn de greno. Ĉie viglas laborado kaj regas prospereco.

Parolante pri tiuj ŝanĝiĝoj, la komunumanoj ofte menciis kamaradon Lan Hajhong, la sekretarion de la partia komitato de la komunumo.



Lan Hajhong kaj komunumanoj kune laboras.

Komence de la vintro, 1965, kun arda volo konstrui novan socialisman montregionon, la jaŭnacia kadro Lan Hajhong, deveninta de malriĉa familio, prenis sur sin la oficon de sekretario de la partia komitato de la komunumo "Tri Kaproj", kun komisio de la Partio kaj popolo. Frue en 1952, tuj post sia aliĝo al la revolucio, li partoprenis tie la grandan demokratian reformon kaj vivis kun la diversnaciaj popolanoj en profunda amikeco. Ĉifoje denove veninte al la loko, li sentis en si apartan karecon por ĉiu monto kaj rivero.

La popolkomunumo "Tri Kaproj" situas en montregiono abunda je rokoj. Ĝiaj 12,000 muoj da agro, escepte de pli ol 1,000 muoj da ebenaĵo inter rokaj montoj, ĉiuj dislokiĝas sur pli ol 1,200 rokaj deklivoj kaj ĉiam estas atakataj de sekegeco aŭ inundo. Kiam Lan Hajhong venis al la komunumo, ĝia produkto ankoraŭ restis postiĝinta. Antaŭ li staris la problemo kiel transformi la fizionomion de "Tri Kaproj".

Por solvi tiun problemon, Lan Hajhong decidis fari enketon inter komunumanoj. Li transiris montojn kaj vizitis sep produktajn brigadojn. Ĉie li vidis ke la komunumanoj aktive laboras por ŝanĝi la malriĉan kaj postiĝintan fizionomion. Disvolvante la spiriton de lukto en malfaciloj, la amasoj de Giaĉa-produktogrupo reformis deklivajn kampojn en ebenajn ŝtuparajn kampojn. La vintre semita maizo brile verdis en la kampoj. Venkinte multajn malfacilojn, la komunumanoj de Dingdong-brigado elkondukis akvon de subtera rivero kaj tiel solvis la problemon de trinka akvo por homoj kaj brutoj. Rompinte malbonan rutinon, Giahaj-produktogrupo praktikis sciencan terkulturadon kaj konstruis multajn akvajn kaj fekaĵajn basenojn apud kampoj. . . Kun ĝojo, Lan Hajhong skribis en sia taglibro: "Al 'Tri Kaproj' mi havas profundan amon. Mi decidis ŝanĝi ĝian fizionomion per diligenta laboro kune kun la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj."

En konstruado de la socialisma montregiono, Lan Hajhong studis verkojn de Prezidanto Maŭ kaj laboris kune kun la komunumanoj, kaj per tio stimulis ilin. En la jaro 1969, li persone venis al Nonggan-grupo kies naturaj kondiĉoj estas kompare malbonaj. Post pena laborado de unu vintro sub lia gvido, ĝiaj komunumanoj konstruis pli ol 20 muojn da ŝtuparaj kampoj. Lan Hajhong ankoraŭ helpis la kadrojn racie aranĝi laborfortojn por fari brikojn kaj tegolojn kaj konstrui domojn, kaj fine ĉiuj komunumanoj transloĝiĝis en novajn brikajn domojn. La amasoj diris emocie: "K-do Lan ja verŝis sian tutan energion por nia bono!"



Lan Hajhong kaj aliaj partiaj komitatanoj de la komunumo studas kiel reformi montregionon.

Lan Hajhong ofte diras: "Sen enketo oni ne havas rajton paroli; se oni ne donas ekzemplon, iliaj paroloj do ne havas konvinkan forton." Por ŝanĝi la postiĝintan fizionomion de "Tri Kaproj", en la pasintaj jaroj Lan Hajhong kun aliaj komunumaj kadroj sub sia gvido trairis 165 produktajn grupojn kaj 1,200 rokajn deklivojn de la komunumo. Li persone esploris ĉiun rokan deklivon kaj faris skizojn en kelkaj produktaj brigadoj. Kune kun la partiaj komitatanoj de la komunumo li konsideris kie konstrui kampojn, kie planti arbojn, kie dreni montan torenton per kavernoj kaj kie

Lan Hajhong kaj kamparanoj

konstrui fekaĵajn basenojn. . . kaj ellaboris planon kaj poste mobilizis la amasojn al diskutado pri la plano por ĝin efektivigi.

Ŝagoŭ-produktogrupo situas en sabloŝtona ravino. Dum pluvego, montotorento kun sablo kaj ŝtonoj ruliĝis malsupren, tiel ke la fekundaj kampoj antaŭ la vilaĝo ŝanĝiĝis en sabloŝtonejon kaj oni nenion povis rikolti. Lan Hajhong venis al tiu ĉi grupo. Sub lia direktado ĝiaj kadroj kaj komunumanoj konstruis digon por bari sablon, fosis drenan kanalon, formovis sablon kaj alportis teron por konstrui ŝtuparajn kampojn. En malpli ol tri monatoj, ili jam transformis la kampojn kovritajn de sabloŝtonoj. Dank' al la diligenta laboro, ili unuafoje gajnis riĉan rikolton de greno. Sed, en la sekvanta somero, sinsekvaj pluvegoj detruis multajn el la ĵus formitaj kampoj. Lan Hajhong konsiliĝis kun la kadroj kaj amasoj kaj tiuj lastaj opiniis, ke la katastrofo de Ŝagoŭ estas ĉefe kaŭzita de monta torento. Por solvi tiun problemon, oni devas trovi kavernojn por dreni superakvon en subteran riveron. De tiam, kiam pluvegis, Lan Hajhong iris sur montojn por trovi kaŝitajn kavernojn. Iun profundan nokton, pluvegis, li maldormiĝis tutan nokton. Apenaŭ elkrepuskiĝis, li jam petis malriĉkamparanon Tan Mingde iri kune kun li sur montojn por serĉi kavernojn. Tan diris: "Kiel ni povas surmontiĝi en tia pluvego?" Lan respondis senhezite: "Ju pli granda estas la pluvo, des pli bona estas la tempo por serĉi kavernojn." Ili supren refaldis siajn pantalonojn kaj iris sur montojn en pluvego. Tiun tagon, ili trairis du montegojn kaj fine trovis ke akva fluo rapidas al ŝtonfendo, kaj tie ili faris signalon. Poste kiam ili eksplodigis la ŝtonon, tie vere aperis drena kaverno. Li kaj la ŝagoŭ-anoj malfermis kvin kavernojn kaj tiel venkis la superakvon. Dank' al tio tiu grupo gajnis riĉajn rikoltojn de greno jaron post jaro. La partia komitato de la komunumo serioze resumis kaj disvastigis la sperton de tiu grupo, kaj fine forigis superakvan minacon al la pli ol 800 muoj da kampoj en ravinoj de tiu ĉi komunumo.

En la Granda Proletara Kultura Revolucio, Lan Hajhong kun komunumanoj kaj kadroj de tiu komunumo sub sia gvido faris grandskalan reformadon de la naturo kun ankoraŭ pli granda entuziasmo. Poste, li estis elektita kiel membro de la partia komitato de la Du-an-a Jaŭ-nacia Aŭtonoma Gubernio kaj alterna membro de la partia komitato de la Guanghi-a Ĝŭang-nacia Aŭtonoma Regiono. Sed, firme tenante en la koro la instruon de Prezidanto Maŭ **esti kaj kadro kaj ordinara popolano,** Lan Hajhong restas ĉiam kun la amasoj koron kun koro kaj laboris kune kun ili ĉie, kien li iris. Foje, li venis al Huaĝoŭ-produktogrupo, kie komunumanoj eksplodigis ŝtonojn por konstrui ŝtuparkampon. Li demetis sian tornistron kaj tuj eklaboris per ferstango. Oni admonis lin iom ripozi, li diris kun

NOVAJ LOĜEJOJ POR URBAJ LABORANTOJ

Samtempe kun la disvolviĝo de nia socialisma ekonomia konstruado, granda nombro da loĝkvartaloj estis jam konstruita en la diversaj urboj kaj urbetoj tra la tuta lando, kio plibonigis la loĝkondiĉojn kaj plialtigis la nivelon de materia kaj kultura vivo de la vasta laboranta popolo. Dum la pasintaj 22 jaroj, la konstruareo de novaj loĝejoj de ok grandaj kaj mezgrandaj urboj — Pekino, Ŝanhajo, Kantono, Nankino, Tiangin, Huhehoto, Luojang kaj Hefej jam atingis pli ol 62 milionojn da kvadrataj metroj. Ĉirkaŭ 15 milionoj da laboristoj, oficistoj kaj iliaj familianoj enloĝiĝis en la novaj domoj.

PRODUKTO DE OLELINO

La produkto de olelino estas aktive disvolvata en Ĝanggiakoŭ-regiono de Hebej-provinco. Tie estis semitaj 1,350,000 muoj da olelino, t.e. je 11% pli multe ol tiuj en la pasinta jaro. Olelino estas unu el la oleaj plantaĵoj en malvarma regiono norde de la Granda Muro. Ĝi estas ne nur la ĉefa oleo por nutrado de la popolanoj, sed ankaŭ unu el la gravaj materialoj por fari lubrikaĵon. Krome, el ĝiaj tigoj oni povas produkti kemian fibron kun granda ekonomia valoro.

KURACA KAJ HIGIENA AFERO DE TIBETO

Antaŭ la Liberiĝo, la tibetaj servutuloj vivis mizere sen kuraco kaj medikamento de generacio al generacio. Tiam, en Tibeto troviĝis nur unu hospitalo, kiu servis nur por la mastrosinjoroj, kaj kiun la laborantaj popolanoj ne rajtis viziti. En 1951, kiam Tibeto estis ĵus liberigita, la Partio kaj Prezidanto Maŭ sendis tien grandan nombron da kuracaj laborantoj kaj efektivigis senpagan kuracadon. La kuracaj laborantoj helpis la tibetan popolon konstrui hospitalojn en multaj urboj kaj urbetoj kaj faris siajn kontribuojn al la tibeta higiena afero.

Post la demokratia reformo en la Tibeta Aŭtonoma Regiono, la popola kuraca kaj higiena afero akiris plian disvolviĝon. Nun, krom 12 sintezaj hospitaloj de subregiono kaj urbo, estis establita hospitalo aŭ kuracejo en pli ol 70 gubernioj, kaj ankaŭ kuraca stacio aŭ sanitara servo en multaj distriktoj, komunumoj kaj vilaĝoj. La nombro de kuracistoj de la tuta regiono plimultiĝis je pli-ol-3-oblo kaj tiu de la litoj por malsanuloj je pli-ol-8-oblo ol tiu de 1958, la jaro antaŭ la demokratia reformo.

Ĉio ĉi tio donis fidindan sanprotekton al la tibeta popolo, precipe al la tibetaj virinoj kaj infanoj. En la malnova socio, la malriĉaj servutulinoj devigite akuŝis en bovstalo aŭ ŝafejo, kaj pro tio la naskitoj estis malmulte vivaj. Nun, akuŝontinoj povas ĝui senpagan akuŝigon en hospitalo aŭ inviti akuŝistinon al sia hejmo.

rido: "Vi ĉiuj laboras, ĉu mi povas apudsidi senfare?" Instigate de la modela konduto de Lan Hajhong, la komunumanoj laboris fervore, kaj la monata laborefiko de ĉiu homo altiĝis de konstruo de dekono de muo ĝis tri dekonoj. En unu vintro kaj unu printempo, la pli ol 40 laborfortoj de la tuta grupo konstruis pli ol 30 muojn da ebenaj ŝtuparkampoj.

Sub la gvido de Lan Hajhong kaj aliaj komunumaj kadroj, la diversnaciaj popolanoj de "Tri Kaproj" konstruis post plurjara penado, sin apogante sur la propraj fortoj, pli ol 15,000 ŝtonajn murojn per pli ol 1,800,000 kubmetroj da ŝtonoj, pli ol 4,900 muojn da ebenaj ŝtuparkampoj kaj pli ol 1,100 montlagetojn. Dank' al tio, la kampoj de garantiata rikolto malgraŭ sekegeco kaj inundeco multiĝis je pli ol 3,000 muoj, kaj la tuta komunumo gajnis riĉan rikolton de greno jaron post jaro. Lastjare, la pomua produktokvanto de greno atingis 421 kg. kaj la komunumo fariĝis avangarda kolektivo en lernado de Daĝaj tra la tuta gubernio.

La Inundita Regiono de la Flava Rivero Hieraŭ kaj Hodiaŭ

La inundita regiono de la Flava Rivero, kiu estas parto de la ebenejo de la Flava Rivero kaj Huajrivero, sin trovas en la meza parto de Ĉinio. Ĝi estas historia atestaĵo pri la katastrofo kaŭzita de la kuomintanga reakciularo.

En 1938, trupoj de la japana imperiismo invadis Henan. Por ŝirmi sin en fuĝado, kuomintangaj reakciuloj breĉigis la grandan digon de la rivero ĉe Huajuankoŭ en antaŭurbo de Ĝenggoŭ de Henan, tute sen konsidero pri la sekuro de la popolo. Tiu fiago kaŭzis la plej seriozan ŝanĝiĝon de la fluejo de la Flava Rivero, senhejmiĝon de 12,500,000 homoj, morton de 890,000 homoj kaj subakviĝon de 54,000 kvadrataj kilometroj da tero en 44 gubernioj kaj urboj de la provincoj Henan, Anhuj kaj Giangsu. En la plej serioze plagita Henan-provinco, pli ol 600,000 hektaroj da kampoj de 21 gubernioj kaj urboj estis inunditaj kaj pli ol 470,000 homoj dronis. Post la inundo, ŝtopiĝis la fluejo de la rivero, aperis reto de grandaj sulkoj, malordiĝis la akvosistemo, kaj kampoj fariĝis nekultureblaj pro apero de sablomontetoj kaj serioza alkalozo. La postvivantaj laborantaj popolanoj longe vivis en malsato kaj doloro post la katastrofo.

Post la Liberiĝo, sub la helpo de la Partio kaj la registaro, la popolanoj en la inundita regiono de la rivero fosis kanalojn por formi kampojn per sedimentado kaj irigacii kampojn, forstumis, fortikigis digojn kaj kreis putojn, rezulte de kio radikale ŝanĝiĝis la mizerega inundita regiono de la Flava Rivero.

La popolanoj de Hihua-gubernio de Henan en la mezo de la inundita regiono faris peneme en multaj jaroj grandskalan irigacian konstruadon kaj fosis pli ol 3100 grandajn kaj malgrandajn kanalojn, kreante relative kompletan sistemon por drenado kaj irigaciado, dank' al kio finiĝis la tragika historio de "granda pluvo — inundego, eta pluvo — inundeto, senpluveco — trosekeco". La produktokvanto de



Maljuna kamparano Vang Hiaŭŝeng, ĉe la granda digo de la Flava Rivero, akuzas al gejunuloj per sia suferaĵo la krimon de la kuomintanga reakciularo en breĉigo de la digo en 1938.

greno de la tuta gubernio en 1971 estis kvaroblo de tiu antaŭ la Liberiĝo.

Sub helpo de la ŝtato, Huajuankoŭ-komunumo en antaŭurbo de Ĝenggoŭ konstruis kaj reformis per sedimentado pli ol 2600 hektarojn da kampoj. La 13 metrojn profunda lago kun areo de 167 hektaroj formita de inundakvo post kiam Kuomintango brecigis la digon, nun jam fariĝis fekundaj rizkampoj. La pomua produktokvanto de greno de la komunumo en 1971 atingis 265 kg., t.e. 6.5-oblo de tiu antaŭ la Liberiĝo.

La fortikigitaj digoj sur ambaŭ bordoj de la rivero staras kiel grandaj muroj. La Flava Rivero, kiu famiĝis en la historio kiel malutila rivero, jam komencis fari bonojn al la popolo kaj la loĝantoj en la inundita regiono ankoraŭ pli varme amas la belan kaj riĉan riveron.

Fotoj de **Vej Deĝong** kaj **Ju Vejtian**

Mapo pri la inundita regiono de la Flava Rivero. La foto (sube maldekstre) montras mizerajn rifuĝantojn kiuj perdis sian hejmon pro la inundo en 1938 kaŭzita de la kuomintanga reakciularo per detruo de la digo.



Riĉa rikolto de tritiko en la inundita regiono

Intermiksa kulturo de pluraj plantaĵoj por akiri riĉan rikolton.



Greno transportata aliloken por subteni la socialisman konstruadon de la patrolando



Intelektaj junulinoj venintaj el urboj al la inundita regiono por fikse loĝadi tie.

Maljuna kamparano Guo Bingĝi (la unua de dekstre), kiu perdis sian hejmon pro inunda katastrofo kaj fariĝis almozulo antaŭ la Liberiĝo, nun vivas feliĉe kun siaj familianoj. Lia filo laboras kiel librotenanto de produkta grupo kaj lia filino laboras kiel traktoristino.







Parto de la nuna digo de la Flava Rivero

La nove konstruita elektra pumpstacio de Mangŝan sur la suda bordo de la Flava Rivero

Hju Ŝihoŭ, almozulo antaŭ la Liberiĝo, nun laboras kiel sekretario de la partia filio de la Oka Filio de la Ŝtata Agrokultivejo de la inundita regiono de la Flava Rivero.





La akvo transfluigita el la Flava Rivero per la elektra pumpstacio fluas en la urbon Ĝenggŏū tra la kanalo Ginŝujhe por kontentigi bezonojn de ĝiaj industrioj kaj loĝantoj.

Komuna Higiena

Afero de Hefej

Aŭto ŝprucigas akvon sur la strato.



TRE granda ŝanĝiĝo okazis en la komuna higiena afero de Hefej, Anhuj-provinco de nia lando. Tio kreis favorajn cirkonstancaron kaj laborajn kondiĉojn kaj plibonigis sanstaton de la vastaj popolamasoj.

I

Hefej estas antikva urbo kun historio de 2,000 jaroj. Antaŭ la Liberiĝo, ĝi estis konsuma urbo kun 50,000 loĝantoj. Dum la regado de kuomintanga reakciularo, la urbo estis malpura, kaj ĝiaj stratoj mallarĝaj kaj zigzagaj, rubo amasiĝis kaj malpura akvo ĉie fluis. Unuvorte, ĝia komuna higiena afero troviĝis en plena senzorgo. Tio portis gravan katastrofon al la laborantaj popolanoj somere kaj printempe. En 1946, ĥolero cirkulis tra la urbo, kaj ĉiutage nombro da loĝantoj mortis de tiu epidemio. En 1947, B-tipa encefalito atakis la urbon, kaj granda kvanto da malsanuloj ne povis akiri kuracon pro malhavo de mono. Laŭ statistiko, siatempe mortis du procentoj el la loĝantoj de Hefej, inter kiuj la mortintoj pro epidemioj okupis pli ol duonon.

La hodiaŭa Huajhe-strato



En la jaro 1949, Hefej estis liberigita. Poste ĝi fariĝis provinca urbo de Anhuj, la centro de politiko, ekonomio kaj kulturo de la tuta provinco, kaj disvolviĝis unuapaŝe en sintezan industrian urbon. La Partio kaj Prezidanto Maŭ donis grandan atenton al la sano de la vastaj popolamasoj. La registaro plifortigis sian gvidon de higiena laboro, starigis kontraŭepidemiajn staciojn kaj administrejon de urba higieno. Ĉiujare, la ŝtato asignas specialan monon al la komuna higiena afero. Oni dragis riverojn, ebenigis malpurajn kanaletojn kaj lagetojn, elfosis subterajn kloakojn longajn je pli ol 700,000 metroj, konstruis komunajn necesejojn kaj rubaĵkestojn kaj disponas cisternokamionojn kaj kamionojn por transporti fekaĵon kaj rubaĵon. Ĉiumatene, la purigistoj balaas stratojn. Dum somero, aŭtoj ŝprucigas akvon sur stratoj. Dank' al ĉio ĉi tio, la laboristoj, lernantoj, kadroj kaj aliaj loĝantoj povas vivi kaj labori en freŝa aero. La nuna urbo aspektas pli pura kaj vivoplena.

La rivero Giuŝihe kun longeco de 3 kilometroj, fluanta de oriente okcidenten tra la urbo, fetore odoris kaj superfluis disen dum la inunda periodo en la pasinteco. Nun, la urbaj loĝantoj enterigis tie subteran kondukilon 5 kilometrojn longan, ebenigis la riveron, pavimis tiun lokon en avenuon kaj konstruis domojn ĉe ĝi. De tiam, la rivero Giuŝihe ne plu portis al la popolanoj epidemion kaj katastrofon.

II

La kuracaj kaj higienaj unuoj en la malnova Hefej estis malmultaj. En julio de 1947, la ĵurnalo de Hefej "Gongĝengbao" raportis: "En la gubernia urbo okazis encefalito kaj sep malsanuloj mortis en la Krista Hospitalo. La gubernia registaro ne nur ne aplikis urĝan rimedon kontraŭ la epidemio, sed male, ĝi malfunkciigis kontraŭepidemian hospitalon sub la preteksto ŝpari monon por pliigi sekurigajn trupojn." Tio estis atesto pri la krimo de la kuomintanga reakciularo kiu neglektis malsanon de la popolanoj. Kaj tiu ĉi "Krista Hospitalo" de imperiismo por paralizi la ĉinan popolon dividis la malsanulojn en tri klasojn, tial la malriĉaj malsanuloj eĉ ne povis eniri ĝian pordegon.

Kun la disvolviĝo de la socialisma konstruado, la Partio kaj popola registaro disponigis al la popola higiena afero diversajn materiajn kondiĉojn por garantii sanon al la loĝantoj de Hefej. Nun, en la urbo jam formiĝis higiena-kuraca reto de sintezaj kaj fakaj hospitaloj kun modernaj ekipaĵoj. Ĉiu milo da loĝantoj havas 5.3 kuraclitojn kaj 5.6 kuracajn

Angulo de la Popola Hospitalo de Anhuj-provinco

laborantojn. Antaŭ la Liberiĝo, la patrino kaj 19-jara frato de Li Ĉuande, kiu estis etvendisto, mortis de epidemio. Nun, liaj tri filoj kaj unu filino ĉiuj laboras kaj ĝuas senpagan kuracadon, kaj depost starigo de la koopera kuracado en lia kvartalo, ankaŭ li kaj lia edzino ĝuas la senpagan kuracadon.

Observante la principon de Prezidanto Maŭ "**meti preventon en la ĉefan lokon**", la kuracaj laborantoj de Hefej aktive disvolvis preventadon kontraŭ malsanoj. En vintro, timante nek malpurecon nek laciĝon la kuracaj laborantoj de kontraŭepidemiaj stacioj iris en la subteran malpurakvan kanalon por fari esploron kaj ekstermis la ovojn de kuloj kaj muŝoj per fumajiloj por redukti disvastiĝon de malsanoj en somero. Post alveno de somero, la urbaj loĝantoj disvolvas patriotan higienan movadon. Ili sarkas herbojn, faras purigadon kaj ŝprucigas insekticidon por ekstermi kulojn. Dank' al ĉio ĉi tio, multaj malsanoj reduktiĝis, la infektaj malsanoj estas ĝustatempe briditaj, kaj la epidemioj kia Ĥolero jam estis komplete forigitaj.

III

Por kontentigi la bezonon de produkta kaj konstrua disvolviĝo kaj loĝantara kresko, la higienaj fakoj de Hefej aktive partoprenis en esplorado kaj projektado pri la urba konstruado kaj elmetis proponojn pri cirkonstanca higieno, lokiĝo de fabrikoj kaj aliaj entreprenoj konstruotaj aŭ plivastigotaj, protekto de aero kaj akvofontoj kaj aranĝo de stratoj kaj loĝkvartaloj, per tio oni radikale forigis faktorojn malutilajn al la urba pureco kaj homa sano. Krome, oni sinteze utiligas senutilajn industriajn

La Ĝenerala Kotonŝpinteksa kaj Prestinktura Fabriko faras traktadon pri malpura akvo. Jen la laborantino prenas specimenon de akvo por kemia analizo.

akvon, gason kaj skorion. La Ĝenerala Kotonŝpinteksa kaj Prestinktura Fabriko de Anhuj ĉiutage ellasis grandan kvanton da malpura akvo, kio malbone influis la agrikulturan produktadon kaj higienon de urba cirkonstanco. La laboristoj kaj oficistoj de la fabriko ŝanĝis la malpuran akvon en klaran por reuzado per la biologia kaj kemia traktado. Post la traktado, la precipitita ŝlimo fariĝis azotoza sterko, kaj per tio ili subtenis agrikulturan produktadon. Dank' al la sinteza aplikado de senutilaj akvo, gaso kaj skorio, oni kreis favorajn kondiĉojn por disvolvi industrian kaj agrikulturan produktadon kaj garantii sanon de la popolanoj.

Sekurigi la laborulojn kaj protekti ilian sanon en produktado estas unu el la gravaj principoj de la socialisma Ĉinio. La kuracaj laborantoj de Hefej ofte iris al fabrikoj kaj laborejoj por ekzameni polvon, akvon kaj gason, periode radiografi bruston kaj ekzameni korpon kaj disvolvi amasan aktivadon kontraŭ polvo, veneno kaj sunfrapo, tiel efike protektis sanon de laboristoj. Samtempe, la ŝtato ankaŭ ĉiujare donas specialan monon por plibonigi laborajn kondiĉojn kaj plifortigi protekton de sano. Kaj laŭ malsamaj laborspecoj, laboristoj kaj oficistoj de fabrikoj kaj aliaj entreprenoj povas ĝui subvencion por nutro kaj protektaĵojn. Senĉesa plibonigo de la laboraj kaj higienaj kondiĉoj kreis favoran cirkonstancaron por laboristoj kaj oficistoj.

Dongfeng-parko de Hefej



ŜANG VEN:

Rakontoj pri Lusin

Milita Mapo de la Ruĝa Armeo

En la jaro 1954, dum ordigo de la postlasitaj libroj de Lusin, oni trovis en iu libro pecon da papero. Ĝi estis negranda kaj iom flaviĝinta pro longa konservado. Sur ĝi estis skribita per krajono nombro da nomoj de lokoj, linioj kaj sagopintoj. Ĝi estis milita mapo de la Ruĝa Armeo.

Kial Lusin havis tian mapon? Kial ĝi estis tiel zorge konservata? Mi scias kortuŝan rakonton pri ĝi.

Estis la jaro 1932. Tiam la Ĉina Laborista-Kamparana Ruĝa Armeo brave kaj penige batalis, sub la gvido de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, kontraŭ la "ĉirkaŭekstermo". Iu gvidanto de la Ruĝa Armeo nomata Ĉen Geng serioze vundiĝis en batalo. Ĉar tiam tre mizeraj estis la medicinaj kondiĉoj en la Ruĝa Armeo, la partia organizo sekrete sendis lin al Ŝanhajo por kuracado. Pri tio informiĝis Lusin, kiu dumlonge atentis kun fervoro la bataladon de la Ruĝa Armeo, sed pro blokado de la kuomintanga reakciularo neniam povis akiri fidindajn informojn. Jen bona ŝanco okazis, Lusin do invitis kamaradon Ĉen Geng al sia hejmo pere de alia.

La invito de Lusin metis kamaradon Ĉen Geng en dilemon. Same kiel aliaj kadroj de la Ruĝa Armeo, li tre varme amis Lusin kaj en la malfacilaj batalaj cirkonstancoj kunportis verkojn de Lusin por legi dum interbatalaj paŭzoj. Kiel ĝojinde estis por li, ke li povos intervidiĝi kun Lusin? Sed kamarado Ĉen Geng pensis, ke li estas persekutata de la kuomintanga reakciularo, kaj timis ke lia vizito al Lusin povas endanĝerigi lin, tial li fine decidis ne iri al li.

Sed Lusin foje kaj refoje invitis lin. Kamarado Ĉen Geng estis forte kortuŝita de la profunda klasa sentimento kaj sentima revolucia spirito de Lusin kaj fine li venis al lia hejmo posttagmeze de iu aŭtuna tago.

Kiel ĝoja Lusin estis, kiam li vidis kamaradon Ĉen Geng. Li preparis tre abundan manĝon por regali la gaston kaj petis la lastan rakonti kiel batalas la Ruĝa Armeo kaj la popolo en la revolucia bazloko.

Kamarado Ĉen Geng faris detalan rakonton, dume Lusin plenatente aŭskultis fumante kaj fiksrigardante lin kun la kapo flanken klinita. Kiam li aŭdis, ke la de li bone konataj mizeraj kamparanoj en la ruĝa bazloko jam liberiĝis kaj fariĝis mastroj, ĝoja rideto aperis sur lia vizaĝo. Li demandis, ĉu la bienuloj reatakis kaj kiel ili reatakis. Li ankaŭ demandis kiel vivas la kamparanoj, ĉu boniĝis la higienaj kondiĉoj aŭ ne . . . Lusin ricevis kontentigajn respondojn kaj ĉiuj liaj demandoj montris lian varman amon al la ruĝa bazloko sub la gvido de la Partio kaj lian zorgon al la laboranta popolo.

Lusin pli detale demandis pri la militado de la Ruĝa Armeo kaj li ĝojkriis en sia koro pro ĉiu el ĝiaj venkoj. Por bone prezenti la aferon, kamarado Ĉen Geng pentris mapon dum sia rakontado.

Baldaŭ falis nokto. Lusin adiaŭis kamaradon Ĉen Geng kun bedaŭro. Reveninte en la ĉambron, Lusin longe ne povis kvietiĝi rigardante la mapon desegnitan de kamarado Ĉen Geng kaj remaĉante liajn batalajn rakontojn. Por plivastigi influon de la Ruĝa Armeo kaj kuraĝigi la tutlandan popolon, Lusin intencis verki romanon pri la batalado de la Ruĝa Armeo kun tiaj rakontoj kiel materialo. Konsiderante eventualan bezonon por la verkado kaj ankaŭ por memorigi la eksterordinaran interparolon, li serioze metis la valoregan mapon en iun libron. . .

Limigite de tiamaj kondiĉoj, Lusin ne havis tempon por verki romanon, sed lia amo al la Partio pli kaj pli profundiĝis. Per sia batalado li verkis eĉ pli kortuŝan majstraĵon ol romano.

Dujarojn post la interparolo de Lusin kun kamarado Ĉen Geng, la kvina kontraŭ-"ĉirkaŭekstermo" fare de la Ruĝa Armeo malvenkis, pro detruado de la oportunisma linio de Vang Ming. En oktobro de 1934, la Ruĝa Armeo devis komenci la Longan Marŝon. De tiam, Lusin ĉiam klopodis por akiri informojn pri ĝia aktivado. Kaj poste, kiam li aŭdis, ke la Ruĝa Armeo, sub la gvido de Prezidanto Maŭ, fiaskigis persekutadon kaj baradon de la kuomintangaj trupoj kaj triumfe atingis nordan Ŝenhi venkinte milon kaj milon da malfaciloj, li tiel ĝojiĝis, ke li tuj sendis telegramon al Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Partio kun la jena teksto:

"Vi portas sur vi la esperon de Ĉinio kaj la homaro."

Tiuj vortoj el la korfundo plene manifestis la amon de Lusin al la Partio kaj Prezidanto Maŭ.

En la longa nokto, Lusin rigardadis al la brila Bejdoŭ (t.e. la 7 ĉefaj steloj de la Granda Ursino) en la nordo, ĉerpis el ĝi grandan forton kaj batalis ankoraŭ pli brave kaj obstine.

La Plej Fidinda Kamarado de Komunistoj

Iutage je la fino de 1935, iu junulino venis de Gianghi al la hejmo de Lusin por lin viziti. Ĉar ĝuste tiam Lusin forestis, la junulino restigis paperan paketon de skribaĵoj kaj foriris.

Post nelonge, Lusin revenis, liaj familianoj tuj diris tion al li.

"Ĉu de Gianghi?" Lusin tuj transprenis la paketon, ĝin metis sur la skribotablon kaj zorge ĝin malfermis. En ĝi troviĝis stako da manuskripto skribita per ĉina peniko. Ĉe la supro estis kvar neskribitaj folioj kaj ĉe la supra dekstra angulo de unu el ili troviĝas inkmakulo. Krom tio troviĝis ankaŭ notoslipo sen subskribo de la skribinto, kiu sciigas al la ricevinto, ke la makulita papero estas letero skribita per riza supo.

Sekreta intervidiĝo de Lusin kaj k-do Ĉen Geng, aŭtune de 1932.

Lusin zorgeme ŝmiris la neskribitan paperon per joda tinkturo kaj poste ĝin zorge metis en akvopelvon. Iom poste vortoj aperis sur ĝi. Lusin tuj sin klinis por legi la subskribon kaj al liaj okuloj sin ĵetis la nomo: Fang Ĝimin.

"Fang Ĝimin!" La koro de Lusin ekkuntiriĝis. Antaŭ kelkaj monatoj li jam informiĝis de ĵurnalo de la malamiko, ke la fame konata komunisto jam heroe martiriĝis en Nanĉang. Nun, antaŭ liaj okuloj tamen aperis letero propramane skribita de la martiro!

Li sin iom kvietigis kaj komencis legi la leteron. Kamarado Fang Ĝimin skribis, ke la letero estis skribita en karcero de Kuomintango, ke li jam firme decidis oferi sian vivon kaj petis, ke sinjoro Lusin klopodu por transdoni la tri

aliajn neskribitajn foliojn kaj la manuskriptojn al la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio. Kamarado Fang Ĝimin skribis krome, ke li ne konas Lusin, tamen li kredas ke Lusin povas plenumi la lastan postulon de la komunisto.

Lusin legis kaj relegis la leteron. De Kantono al Ŝanhajo li persone aŭdis kaj vidis, ke multaj kompartianoj heroe oferis sian vivon por la revolucio. Foje kaj refoje li estis kortuŝita de la heroismo de tiuj avangardaj batalantoj de la proletaro kaj foje kaj refoje gravuris profunde en sia koro la sangajn ŝuldojn de la kuomintangaj reakciuloj. Hodiaŭ la mallonga kaj sincera testamento de kamarado Fang Ĝimin denove levis kolosajn ondegojn en la koro de tiu ĉi komunisma batalanto.

Lusin malrapide paŝis al la fenestro. Ekstere la vintra firmamento de Ŝanhajo aspektis plumbe griza. Senkompare peza estis la koro de Lusin, li longe staris senvorte, kvazaŭ funebranta la martiriĝintan kompartianon. . .

Jen kio okazis al la martiro:

En januaro de 1935, kamarado Fang Ĝimin estis arestita pro denunco de perfidulo, en batalo kontraŭ kuomintanga trupo en Dehing-gubernio de Gianghi. Post la arestiĝo, kamarado Fang Ĝimin sin montris nefleksebla antaŭ la malamiko. En la karcero, li skribis la batalajn artikolojn *Notoj en Karcero*, *Aminda Ĉinio* ktp., per la skribiloj, donitaj de la malamiko por ke li skribu "konfeson", kaj ankaŭ sekretan leteron per riza supo al la Centra Komitato de la Partio. Finskribinte la artikolojn kaj leteron, kamarado Fang Ĝimin denove falis en profundan meditadon: Tiam la Ruĝa Armeo ankoraŭ estis sur la vojo de la Longa Marŝo kaj estis neeble trovi la subteran organizon de la Partio. Kiel do oni povis sendi la leteron kaj manuskriptojn al la Centra Komitato de la Partio? Kamarado Fang cerbumis kaj cerbumis, kaj finfine kvazaŭ hela sunradio penetris en la malluman karceron, en lian kapon venis ideo pri Lusin. "Jes, mi petos helpon de sinjoro Lusin!" Kamarado Fang Ĝimin tion decidis. Li neniam vidis Lusin, sed li legis artikolojn de Lusin kaj sciis, ke Lusin estas la plej fidinda kamarado kaj kunbatalanto de komunistoj, sekve li decidis peti sinjoron Lusin, ke li transdonu la manuskriptojn kaj leteron al la Centra Komitato de la Partio.

Tiam, inter la oficistoj de la kuomintanga karcero sin trovis junulo, kiu tre estimis kamaradon Fang pro lia influo kaj edukado kaj donis multajn helpojn al li en verkado. Foje en profunda nokto, kamarado Fang Ĝimin interkonsiliĝis kun li kaj li

Lusin sendis gratulan telegramon al Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Partio, kiam la Ruĝa Armeo venke atingis la nordan Ŝenhi post la Longa Marŝo.

konsentis sendi la manuskriptojn kaj leteron per lia fianĉino al Lusin en Ŝanhajo. Kaj la junulino, kiu vizitis la hejmon de Lusin, estis ĝuste lia fianĉino.

Ĉar la vojo estis malfacila, kiam la dokumentoj atingis la manojn de Lusin, jam estis la fino de la jaro, kaj kamarado Fang Ĝimin heroe oferis sian vivon jam frue en la somero.

Lusin revenis de la fenestro al la skribotablo kaj komencis legi la verkojn de kamarado Fang Ĝimin *Notoj en Karcero*, *Aminda Ĉinio* k. a. kun funebro kaj majesto. Refoje li estis kortuŝita de la profunda revolucia sentimento en la verkoj. Finleginte, li repakis ilin kaj konservis kiel plej valoran objekton.

Post longa klopodado, finfine Lusin sukcesis transsendi la dokumentojn al la Centra Komitato de la Partio, je duona jaro antaŭ sia morto.

**Fang Ĝimin (1899-1935), politikisto de la Komunista Partio de Ĉinio, kiu fondis la revolucian bazlokon de nordorienta Gianghi kaj la Dekan Armeon de la Ĉina Laborista-Kamparana Ruĝa Armeo. En 1931, li estis elektita kiel membro de la Plenuma Komitato de la Centra Demokratia Registaro de Laboristoj kaj Kamparanoj. En 1934, li estis elektita kiel membro de la Centra Komitato en la Kvina Sesio de la Sesa Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio. En 1935, li estis mortigita de Kuomintango en Nanĉang.*

Nokto de Montvilaĝo

ĴUS reveninte al la hejmvilaĝo forlasita multajn jarojn, mi aŭdis de la disaŭdiga stacio de la komunumo jenan informon: "Antaŭvespere de la Majfesto la pli ol 1,000 familioj de dekkelke da brigadoj de nia komunumo ĉiuj jam havas elektran lampon por lumigo!" Tiu informo tuj vigligis la montvilaĝon.

"Lumigo ne per oleo" estis fabelo por ni montvilaĝanoj. En la pasinteco oni revis multe pri tio, sed tio nun realiĝis.

Mi dronis en ĝojo. Mi rigardis la brilan elektran lampon, pasintaĵo reaperis antaŭ miaj okuloj. Antaŭ la Liberiĝo nia vilaĝo famiĝis pro malriĉeco. Nigra fumo de pina torĉo nokte vualis la ĉambron tiel dense, ke eĉ kraĉaĵo en la sekvanta tago estis nigra. Tiam cirkulis tia popolkanto: "Ne havante monon por aĉeti oleon, por lumigo oni devas uzi pinan torĉon, la okuloj suferas de ĝia fumo ĝis larmiĝo." En la malnova socio, malriĉuloj suferis de kruela subpremado kaj laboris en mallumo post la taga laborado, tial iuj el ili perdis sian vidadon pro manko de lampo. Mia najbarino blinda onklino estis unu el ili.

En sia 17-jaraĝo la onklino fuĝis al nia vilaĝo pro natura katastrofo. Mia najbaro Vang Aping akceptis ŝin kiel sian edzinon. Tamen nelonge post la geedziĝo li estis perforte rekrutita de reakcia trupo kaj mortis pro turmentado post malpli ol duonjaro. De tiam la juna onklino fariĝis vidvino. Por vivteni la bogepatrojn ŝi tage laboris ĉe bienulo kiel bruto kaj nokte devis kudri kaj brodi por aliaj sub pina torĉo. Foje, ŝiaj pinaj lignopecoj eluziĝis kaj ŝi kudris ion sub altaraj lampoj de la budaa halo de la bienulo. Neatendite, ŝi estis rimarkita de la bienulo kaj ricevis solidan baton. La bienulo insultis ŝin: "Vi, malriĉa sentaŭgulino, ja estas malpia al la dio kaj la ĉielo, eĉ kuraĝas kudri sub la altaraj lampoj kaj malbenis mian familion." Reveninte hejmen la onklino grave malsaniĝis de indigno. Poste, kvankam ŝi resaniĝis tamen ŝiaj okuloj perdis vidadon.

Post sia blindiĝo, ŝi ne plu povis labori ekstere, palpe tordis hejme pajlan ŝnuron kaj plektis pajlajn sandalojn. Iuvespere, mi naive demandis ŝin, kial ĉe la pordo de la bienuloj pendas grandaj lanternoj, dum en nia domo eĉ olelampo ne estas. La onklino indigne diris: "Infano, ili estas riĉaj kaj potencaj, dum ni malriĉaj." Sidante ĉe la onklino, mi rigardis trembrilajn stelojn sur la ĉielo kaj diris naive: "Kiel bone estus se ni povus depreni stelon kaj ĝin pendigus en la domo!" Kun amara rideto la onklino rakontis al mi: "Antaŭ longe, estis knabo

nomata Ahua. En songo li vidis blankharan maljunulon, kiu diris al li, ke la brilantaj steloj sur la ĉielo estas gemoj, kaj tiaj gemoj troviĝas ankaŭ surtere, tamen ili estas kaŝitaj sub granda monto aŭ profunda lago nekonata; se oni povos ilin trovi kaj disdoni al ĉiuj malriĉuloj po unu gemon, tiam nokto fariĝos luma kiel tago. Tiu knabo vekiĝis kaj la maljunulo malaperis. En la sekvanta tago, li diris nenion al siaj gepatroj kaj ŝtele foriris kun litaĵo kaj manĝaĵo por serĉi la gemojn. Li serĉis kaj serĉadis, trairinte altajn kaj krutajn montojn, grandajn kaj malgrandajn riverojn. La knabo fariĝis maljunulo, tamen la gemoj estis netrovitaj. En la domoj de malriĉuloj nokte regis mallumo kiel antaŭe. . ."

La rakonto rompis mian revon.

Ĝuste kiam mi dronis en la pasintaĵo, subite iu laŭte diris ekster la pordo: "Oni diris, ke Dalin revenis, ĉu vere?" Kaplevante mi vidis, ke venis iu onklino kun ĉirkaŭ 70 jaroj. En tute nova supervesto kaj nigra pantalono, ŝi aspektis tre viglecplena, kvankam sur ŝia frunto gravuriĝis profundaj sulkoj. Mi alpaŝis, sed ne sciis kion diri. Kiu ŝi estis? Kiam mi estis hezita, mia malgranda nevino, kiu skribas sub la lampo, kuris al ŝi kaj ameme vokis: "Avino, sidiĝu ĉi tie!" Ĉu ŝi ne estas la blinda onklino? Antaŭe ŝi estis blinda, tamen nun antaŭ mi staras klarvida maljunulino. Mi preskaŭ ne kredis miajn okulojn. Ĉe mia miro, la onklino ŝerce diris al mi: "Dalin, ĉu vi laboristo ne rekonis vian onklinon?" Mi iom embarasiĝis kaj ĝoje diris: "Ho, onklino, kiel granda estis la sanĝiĝo, preskaŭ mi ne povas rekoni! Vi ja fariĝis pli juna." "Ĉion ĉi tion mi ŝuldas al la Kompartio kaj Prezidanto Maŭ. Alie, mi de longe cindriĝus!" Tion dirante, la maljunulino serene ekridis.

Mi helpis la onklinon sidiĝi sur la seĝo kaj regalis ŝin per kukoj. Mi demandis ŝin: "Kiam viaj okuloj estis kuracitaj?" Ŝi respondis: "Antaŭ tri jaroj! En 1969, Prezidanto Maŭ sendis kuracan taĉmenton de ĈPLA al nia vilaĝo. Ili ja estas intimuloj de ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj! Tuj post sia alveno, ili nin vizitis kaj demandis, kiel mi blindiĝis. Poste, ili diris al mi: 'Avino, via blindiĝo estas akuzo pri la damninda malnova socio. Ni nepre resanigos viajn okulojn, por ke vi bone rigardu sanĝiĝon de la hodiaŭa socialisma montvilaĝo.' Dank' al ilia zorgema kuracado, mi vere reakiris vidadon. Kiam mi vidis portreton de Prezidanto Maŭ sub elektra lampo, mi pretervole kriis: 'Vivu, vivu longe Prezidanto Maŭ!'

"En la pasinteco ni malriĉuloj ne havis olelampon por lumigo. Dalin, ĉu vi ankoraŭ memoras, kiel vi aspiris al lampo en via knabeco?" Mi respondis kapjesante: "Mi memoras."

Post momenta silento la onklino diris: "En la komenca periodo post la Liberiĝo, kiam vi estis en la vilaĝo, vi parolis pri lumigado ne per oleo kaj plugado ne per bovo, tion mi ne kredis tiam. Nun ni havas elektran lampon kaj la brigado traktoron... ha, ha, ha." Elkore ridis la maljunulino.

"Onklino, por ĉiam forpasis tiuj suferplenaj jaroj. Hodiaŭ ni laboranta popolo estas mastro de la ŝtato kaj nia vivo boniĝas jaron post jaro..."

"Jes, mi ja estas ekzemplo. Kvankam mi ne havas gefilojn, tamen la brigado tre bone zorgas min kvazaŭ mi vivus inter gefiloj. Oni diras, ke sukerkano estas pli dolĉa je la malsupra parto. Mi ĝuas feliĉon en la lasta duonvivo! Prezidanto Maŭ ne nur alsendis kuracistojn por resanigi miajn okulojn, sed ankaŭ instaligis por mi elektran lampon. Blindulo revidis lumon kaj elektra lampo lumigas eksterordinare brile!" Ĉe tio la maljunulino ĝojis kvazaŭ infano.

Ni, kvazaŭ longe neviditaj parencoj, multe parolis pri pasintaj amaroj, granda ŝanĝiĝo de nia montvilaĝo kaj bela perspektivo....

Jam estis malfrue post foriro de la maljunulino, tamen mi havis nenian dormemon. Mi senbrue malfermis la pordon kaj eliris. Mi ascendis la monteton post la vilaĝo kaj de tie rigardis la ĉirkaŭaĵon. Kiel bela estas la nokto de la montvilaĝo. El fenestroj radias lampolumoj kaj inter verdaj arbaroj trembrilas vojaj lampoj kiel steloj sur la ĉielo. Ankaŭ brilas belaj lumpunktoj malproksime en la montvalo longa je kvin kilometroj, la malgranda hidroelektrejo baniĝas en lumo, kaj lampolumoj sur la digo rebrilas en la ondetanta lago.

MULTAJ PUMPOPUTOJ KONSTRUIĜIS EN NIA KAMPARO

En la amasa movado de lerno de Daĝaj en agrikulturo, subtenate de la ŝtato kaj sinapogante sur la kolektivaj ekonomiaj fortoj kaj la saĝo de la amasoj, la vasta kamparo de nia lando energie klopodas konstrui pumpoputojn, por ekspluati kaj utiligi subteran akvon, kaj vastigi la agrikulturan irigacian areon kaj akiris rimarkindan atingon. Dum la printempaj plugado kaj semado de la kuranta jaro, pli ol 70,000 novaj pumpoputoj estis konstruitaj kaj komencis ludi sian rolon en la agrikultura produkto.

80 procentoj de la pumpoputoj de nia lando dislokiĝas en la nordaj ebenejoj. En la lastaj jaroj, dum grandskala konstruado de akvoutiligaj sistemoj, la provincoj Ŝandong, Henan kaj Hebej konstruis pli ol 400,000 pumpoputojn, kiuj estis pli ol kvaroblo de tiuj antaŭ la granda kultura revolucio, kaj la areo irigaciata per pumpoputoj jam okupas duonon de la totala irigaciata areo. En kelkaj sudaj provincoj de nia lando, krom plena utiligo de surtera akvo oni ankaŭ konstruis pumpoputojn por utiligi akvon de subteraj riveroj kaj kalkŝtonaj kavernoj. La miloj kaj miloj da pumpoputoj jam ludas certan rolon por akceli la agrikulturan pliprodukton kaj fortikigi la kolektivan ekonomion.

PRECIZA TRAKA PESILO

Laboristoj, kadroj kaj teknikistoj de la Dalian-a Pesila Fabriko de Liaŭning-provinco kune projektis kaj provfabrikis la unuan precizan trakan pesilon de nia lando.

La maksimuma peskvanto de la pesilo estas 150 tunoj, kaj ĝia minimuma peskvanto estas 7.5 kg., ĝia sentiveco toleras nur eraron de dudekmilono. La preciza traka pesilo aplikis modernajn teknikojn de aŭtomata pesado, aŭtomata registrado ktp. Ĝi povas rapide kaj ĝuste montri la pezon de varoj en vagono. Kiam vagonaro plena de erco trapasas la pesilon kun rapideco de 25 km. po horo, ne aliformiĝas la strukturo de la pesilo, nek ŝanceliĝas la platformo de la pesilo. Se trajno restigis vagonon sur la pesilo kaj pesisto ekpremis la elektran butonon, tiam indikaj ciferoj rapide eksaltadas kaj fine montras la pezon de la vagono. Poste, la pesilo tuj aŭtomate klare registras la ciferon sur slipo. La tuta procedaro bezonas nur 40 sekundojn.

HIPERBOLA ARKPONTO

Pontokonstruaj laboristoj de Giangsu-provinco en la malsupra baseno de Jangzi-rivero kreis hiperbolan arkponton kun naciecaj karakteroj kaj per tio faris kontribuon al la disvolviĝo de ŝosea trafikado en ebenejaj regionoj abundaj je riveroj. Ekde 1964, en la provinco jam estas konstruitaj pli ol 1,200 definitivaj hiperbolaj arkpontoj de ŝoseoj kun totala longo de pli ol 33,000 metroj.

La hiperbola arkponto rezultiĝis el disvolvado de la avantaĝoj de antikvaj ŝtonaj arkpontoj de nia lando. Ĝi havas larĝajn spanojn kaj grandan portokapablon, kaj estas facile kaj rapide konstruebla. Ĝi povas esti konstruita el brikoj, ŝtonoj aŭ ferbetono. Ĝi ne bezonas altigi la vojbazon por formi akre leviĝantan deklivon. Kompare kun konstruado de ordinara ponto, tiu de ĝi povas ŝpari 80% de ŝtalo, 2/3 de la elspezo. Oni bezonas nur 40 tagojn por finkonstrui hiperbolan arkponton kun spano de 50 metroj.

La Ĝardenoj en Suĝoŭ

"*Belas paradiz' sur la ĉielo, same Suĝoŭ, Hangĝoŭ sur la tero.*" Parolante pri la urbo Suĝoŭ, nature oni tuŝas ĝiajn ĝardenojn.

En la sudokcidenta parto de Suĝoŭ ondas montaro tuj apud Tajhu-lago. Kaj ĝiaj nordorienta kaj suda partoj estas borderataj de multaj kristalaj lagetoj. Tie sin trovas multaj ĝardenoj kiaj Ĝuoĝengjuan, Liujuan, Jijuan, Canglangting, Ŝizilin, k.a. La ĝardenoj en Suĝoŭ estas ĝardenistikaj elitoj en suda Ĉinio, kaj tie ĉu herbo aŭ arbo, ĉu monteto aŭ rivereto, ĉiuj estas artisme aranĝitaj kun originaleco, kaj iuj el ili logas per sia maldensa aranĝo dum aliaj per sia densa.

La ĝardeno Ĝuoĝengjuan en la nordorienta parto de la urbo estas konstruita en Ming-dinastio (1368-1644 p.K.), kiu reprezentas nian ĝardenistikan arton de tiu dinastio. La plej rimarkinda karakterizaĵo de tiu ĝardeno estas ke tri kvinonoj de ĝia totala areo estas akvo, kaj 80-90% de la ĉefaj konstruaĵoj estas apudakvaj. Tie estas diversformaj pontetoj kun malalta kaj zigzaga balustrado tuj super la akva surfaco, kio frape impresas kiel akvoriĉa loko. Okcidente de la ĝardeno troviĝas kiosko, kiu estas nomata Ventumila Kiosko, pro siaj pordoj, fenestroj kaj ŝtonaj tabloj kaj seĝoj en ventumila formo. Se oni rigardas eksteren tra la ventumilformaj fenestroj, la vidata pejzaĝo aspektas kvazaŭ pentraĵo sur ventumilo. Krome, ankaŭ multaj antikvaj elpendaĵoj kaj ŝtonaj memorskriboj, kaligrafaĵoj kaj pentraĵo estas bone konservataj en ĝi. Precipe en la lastaj jaroj, la loĝantaro de Suĝoŭ rekonstruis kaj vastigis nemalmultajn konstruaĵojn kaj ankaŭ plantis pli ol 500 diversspeciajn rarajn



Angulo de la ĝardeno Ĝuoĝengjuan



La ĝardeno Ŝizilin

fruktarbojn kaj florojn. Ankaŭ al la salonoj, haloj kaj pavilonoj aldoniĝis multaj novaj dekoracioj kaj artaĵoj. Veninte en la halon "Lanhjuetang" ĉe la orienta pordo de la ĝardeno, oni tuj vidas detalan pentritaĵon pri la panoramo de Ĝuoĝengjuan kun freŝaj koloroj, kiu estas kaj belarta verko kaj gvidilo por la vizitantoj.

La ĝardeno Liujuan estas unu el niaj gravaj protektendaj historiaj restaĵoj, kun areo de ĉ. 50 muoj. Ĝi povas esti dividita en kvar partoj: La centra karakteriziĝas per lagetoj, arboj kaj ŝtonoj; la orienta per zigzagaj kortoj kaj koridoroj; la norda per kampara gusto; kaj la okcidenta per natura pejzaĝo. Ĝi koncentris en si majstraĵojn de la ĝardenistika arto kaj estas rara ĝardeno. Sed, tiu fama ĝardeno, kiu estas kristalo de la kreivo de nia laboranta popolo, estis serioze detruita de kuomintangaj garnizonaj trupoj antaŭ la Liberiĝo, tiel ke kliniĝis la haloj, koridoroj, pavilonoj kaj kioskoj kaj ĉie troviĝis ruinoj. Post la Liberiĝo, kun granda atento al la riparado de la ĝardenoj, la Partio kaj registaro speciale donis monon kaj asignis laboristojn por tio. Dank' al streĉa rekonstruo, la ĝardeno fariĝis ankoraŭ pli bela kun nova aranĝo de la konstruaĵoj kaj dekoracio.

La ĝardeno Ŝizilin estas konstruaĵo de Juandinastio (1271-1368 p.K.). Ĝi estas ne tre granda, sed ekstreme eleganta. En ĝia sudorienta parto estas artefaritaj montetoj kaj en ĝia nordokcidenta parto estas interligitaj akvoj; longa koridoro serpentumas zigzage jen supren jen malsupren. Multaj truozaj rokoj en strangaj formoj staras arope. Geknaboj ofte ĉasas unuj aliajn en la spirala kaverno de artefarita monteto, plenigante la antikvan ĝardenon per ĝojaj ridoj. La artefaritaj montetoj konsistas el truozaj ŝtonoj de Tajhu-lago, kiuj ricevis strangajn formojn pro korodado de ondoj dum miloj kaj miloj da jaroj. En tiu ĝardeno, multaj ŝtonoj similas al leono, kaj pro tio ĝi ricevis sian nomon Ŝizilin (t. e. leonaro). La ŝtona zigzaga kaverno en artefarita monteto estas tre interesa. Ĝi estas speco de labirinto. Iufoje, post longa antaŭenirado, oni tamen revenas al la startejo. Iufoje, vi kaj viaj kunvizitantoj distancas nur kelkajn paŝojn, kaj vi povas vidi ilin tra la ŝtonaj truoj kaj aŭdi ilian parolon, tamen por atingi ilin, vi devas iri longan kurban vojon.

Krome, bone konataj estas ankaŭ aliaj famaj vidindaĵoj en Suĝoŭ, kiaj estas Hanŝan-templo, Canglangting, Hukiu, Hijuan kaj Gieĝuangljutemplo, kie estas statuoj de 500 arhatoj kaj granda nombro da budaismaj dioj.

La ĝardenoj de Suĝoŭ estas eminenta kultura heredaĵo de nia popolo. Ili ne plu apartenas al malmultaj ekspluatantoj, sed fariĝis bonaj promenejoj por la laboranta popolo post laborado. Precipe en festaj aŭ feriaj tagoj sennombraj vizitantoj estas akceptataj de ili. Laŭ statistiko, en 1971, la ĝardenoj estis vizititaj de pli ol tri milionoj da personfojoj.

Silkaj Bildoj de Ĉinio

EN printempo, la sezono de floroj, mi vizitis la Brokatan Teksejon de Hangĝoŭ, kiu plej frue komencis produkti silkajn bildojn en Ĉinio.

La teksejo staras apud la Okcidenta Lago, kiu estas fame konata pro sia belo. La netaj vicoj de laborejoj, ĉarmaj floroj kaj verdaj arboj kaj la alta antikva pagodo post la fabriko kune formas pitoreskan pejzaĝon.

Laboranto de la teksejo diris al mi: En malproksima antikveco nia lando jam komencis produkti silkon. En Tang-dinastio antaŭ pli ol 1,300 jaroj jam aperis brokata teknologio por man-teksi ornamajn desegnojn. La silka teksejo Dongfanghong, kiu komencis sian produktadon antaŭ pli ol 50 jaroj, disvolvis sian brokatan teknologion surbaze de tiu tradicia arto de Ĉinio.

Depost la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, tiu teksejo disvolviĝis rapide sub la helpo de la registaro. Ĝi translokiĝis al pitoreska loko kaj ĝiaj malhelaj kaj kadukaj domoj estis anstataŭitaj de vastaj helaj novaj domoj, la nombro de ĝiaj laboristoj 42-obliĝis kaj ĝiaj elektraj teksiloj 20-obliĝis. La silkaj bildoj produktitaj de ĝi atingis pli ol mil specojn, kiuj estas eksportataj al pli ol 60 landoj kaj regionoj kaj bone akceptataj en la merkatoj enkaj ekster-landaj.

Dum mi iris al laborejoj por pririgardo sub akompano de gastiganta kamarado, li diris al mi, ke por teksi silkan bildon oni devas projekti malgrandan modelon, fari grandigitan desegnon sur kradita papero, pretigi serion da truitaj kartoj kaj plenumi procedon de teksado.

Ekzameno al silka tablotuko

Unue ni eniris la kvietan laborejon de desegnado. La desegnistoj estis atente pretigantaj desegnojn por novaj produktaĵoj ekspozotaj en la foiro de Kantono. Tie laboras grizharaj desegnistoj de la maljuna generacio, junaj metilernantoj kaj ankaŭ junaj studentoj diplomitaj el altaj kaj mezgradaj belartaj lernejoj. En nova rilato la majstroj kaj metilernantoj kune klopodas por daŭrigi kaj disvolvi la eminentan tradician teknologion.

La desegnistoj devas ne nur posedi pentroarton sed ankaŭ koni la strukturon de diversaj taksaĵoj. Ĉar la silkaj bildoj prezentas siajn nuancojn per la interplektitaj vefteroj kaj varperoj, la desegnistoj devas prezenti la nuancojn de bildo per punktoj sur kradita papero, kiu reprezentas la teksaĵon. Ĉar tre variaj estas la nuancoj sur la punktobildo sur kradita papero, tial ĝi tre similas al la originala pentraĵo aŭ foto. Por produkti ĉiun novan silkan bildon, ĉirkaŭ 50 labortagoj estas bezonataj por belarta projektado; kaj por fari relative komplikan koloran teksaĵon, ĉirkaŭ 300 labortagoj estas bezonataj.

En la laborejo de truitaj kartoj, oni transformas la projektan desegnon en multajn kartojn kun po mil truetoj. Ekzemple, la kolora silkbildo "Tigro" produktita de la teksejo bezonas pli ol 25,000 kartojn. La truetoj sur la kartoj direktas la leviĝon kaj malleviĝon de la varperoj kaj naved-kestoj por teksi silkajn bildojn kun diversaj desegnoj. Se unu el la milionoj da truetoj estas misfaritaj, tiam la teksitaj bildoj estos nebonaj.

En la teksa laborejo, ni ne nur vidis, ke vicoj da teksiloj gaje muzikas, sed ankaŭ informiĝis, ke multaj el ili estas projektitaj kaj fabrikitaj de la laboristoj mem de la teksejo. Dekkelke da specoj de koloraj bildoj jam povas esti produktitaj per elektraj teksiloj kaj ilia kvalito estas same bonega kiel tiu de silka bildo teksita per manoj. Starante apud novtipa teksilo, mi vidis propraokule, ke fulmrapide flugadas la navedoj, kaj baldaŭ aperas kolora tigro kun brilaj okuloj kaj fortaj facilmovaj membroj.

La laborejo de pretaj produktaĵoj similas al bunta florĝardeno. Sur la silkaj bildoj vi povas sate aprezi pitoreskajn pejzaĝojn de la tuta lando kaj belajn florojn de ĉiuj sezonoj; vi povas vidi homajn figurojn en diversaj pozoj, flugantajn birdojn kaj galopantajn brutojn similajn al la vivaj. Ili estas kontentigaj regalaĵoj de arto kaj belo por la rigardantoj.

Multenombraj estas la silkaj bildoj de historiaj vizitindejoj kaj pitoreskaj pejzaĝoj de nia lando. Interalie, estas bildoj pri la Malnova Palaco de Pekino, parkoj de Suĝoŭ, la bela monto Huangŝan kun ŝvebantaj nuboj, akvofalo de la monto Luŝan en nebulo, bela rivero kaj mirindaj montoj de Gujlin,. . . bildoj pri Pekina Bejhaj-parko post neĝado kaj tropikaj vidindaĵoj de Hajnan-insulo. Kaj oni ankaŭ povas fari kolorajn bildrulaĵojn aŭ enkadrigitajn bildojn en serioj por esti pendigitaj sur muro, kio donas pli riĉan guston de ĉinaj pentraĵoj.

Depost la Granda Proletara Kultura Revolucio, silkaj bildoj ampleksas plimultajn temojn. En iuj novaj bildoj montriĝas vivecplena revolucia spirito. La silkaj bildoj temantaj pri Ginggangmontaro, Jan-an kaj aliaj revoluciaj lokoj stimulas la popolamasojn peneme lukti en malfaciloj kaj strebadi al progreso; la silkaj bildoj spegulantaj la rapide progresantan konstruadon de Ĉinio stimulas ilian memfidon por gajni ankoraŭ pli grandajn venkojn.

En antikveco estis bela legendo pri teksistino apud la Lakta Vojo. Ŝi estis ne nur bela, sed ankaŭ tre lerta. Per siaj saĝo kaj lertaj manoj ŝi teksis variajn nubojn kaj vesperruĝon. Tiu ĉi antikva revo romantika nun estas efektivigita de la saĝaj diligentaj silkoteksistoj.

Aŭskultu

Esp-an Disaŭdigon

de

Radio Pekino

Por Eŭropo

GMT	Vendredo k Sabato 20:00—20:30
Ondoj(m)	47 45 31 25

Por Japanio, Koreio

Pekina Tempo	Sabato k Dimanĉo 19:00—19:30
Ondoj(m)	47 40

Por Sudorienta Azio

Pekina Tempo	Sabato k Dimanĉo 20:30—21:00
Ondoj(m)	25 19

"Eksterordinaraj Rizpiralidoj"

EN Kiging-brigado de Dianbaj-gubernio, Guangdong-provinco vigle laboras grupo de ekstermado de fiinsektoj. Lernante kaj aplikante la filozofian penson de Prezidanto Maŭ, la grupo ekmastris la leĝon de preventado kaj ekstermado de rizpiralidoj.

Por mastri la leĝon ili trapasis la proceson de praktiko al kono kaj de kono al praktiko.

Estis la sezono de malfrua rizo de 1970. Tiam rizpiralidoj multiĝis pro sekegeco. Por ilin ekstermi, la tuta brigado samtempe aplikis insekticidojn al siaj rizkampoj kaj supozis, ke la rizpiralidoj estas ekstermitaj. Tamen iuj brigadoj akiris rimarkindan efikon dum aliaj nur malgrandan. Stranga estis tio, ke la rizpiralidoj en la rizkampo de la 14-a produkta grupo estis preskaŭ neniigitaj, tamen la insekticido 4-foje aplikita al kampo de la 13-a produkta grupo en ĝia najbareco tute ne efikis.

Leviĝis vigla diskuto pri tio. Iuj opiniis, ke la insekticido senefikiĝis kaj aliaj diris, ke la rizpiralidoj en tiu kampo estas "eksterordinaraj" kaj neekstermeblaj.

La partia vicsekretario de la brigado Jang Jinŝeng kun la kamaradoj de la scienca grupo faris kontrolon en ĉiuj produktaj grupoj kaj konvinkiĝis, ke la insekticido ne senefikiĝis.

Ĉu estis "eksterordinaraj rizpiralidoj" neekstermeblaj? Jang Jinŝeng pensadis pri tio. Iun tagon, li studis la verkon *Pri Kontraŭdiroj.* Prezidanto Maŭ diris: **"Se ni ne konas la universalecon de kontraŭdiro, ni neniel povas eltrovi la universalan kaŭzon aŭ universalan bazon de la movado, la disvolviĝo de objektoj; sed, se ni ne studas la partikularecon de kontraŭdiro, ni neniel povas determini la partikularan esencon per kiu unu objekto diferencas de la aliaj, nek eltrovi la partikularan kaŭzon aŭ partikularan bazon de la movado, la disvolviĝo de objektoj..."** Jang Jinŝeng ĝoje diris al aliaj: "La problemo kuŝas ĝuste en tio, ke ni atentis nur pri universaleco de la kontraŭdiro kaj forgesis ĝian partikularecon.

Subtenate de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, ili specifis kampojn kaj ilin markis per signoj en tago, faris zorgan observadon en nokto kaj trovis, ke neegalaj estas la procesoj de la eloviĝo de la rizpiralidoj en malsamaj naturaj kondiĉoj, kiaj tiu de prospereco de la rizplantaj specioj kaj rezistaj kapabloj de rizplantoj kontraŭ malsano; kaj neegalaj estas la eloviĝaj rapidecoj pro la diferenco de temperaturo de la kampoj, la diferenco de matura frueco de la rizplantoj kaj la diferenco de bonkreskeco de ili. Kvankam la rizkampoj de la du produktaj grupoj kuŝas unu tuj apud la alia kaj samaj estas la naturaj kondiĉoj kaj la uzita kvanto de insekticido, tamen la rizplantoj de la 14-a grupo kreskis pli bone kaj la temperaturo de ĝia rizkampo estis pli alta ol tiu de la 13-a grupo, tial la rizpiralidoj eloviĝis frue kaj mortis ĝuste kiam oni aplikis la insekticidojn. Sed, tiuj de la 13-a grupo ankoraŭ ne eloviĝis, kiam oni aplikis insekticidon, tial la efiko estis ne tiel bona.

La sekreto estis malkaŝita: Ne estis "eksterordinaraj rizpiralidoj". La kaŭzo kuŝis en tio, ke oni ne faris konkretan analizon pri la rizpiralidoj de ĉiu rizkampo kaj aplikis insekticidon ne ĝustatempe.

Kono devenas de praktiko, kaj returne ĝi direktas la lastan. En 1971, la frua rizo de la brigado denove suferis de rizpiralidoj. Ĉi-foje ĉiu produkta grupo aplikis insekticidon laŭ la konkretaj cirkonstancoj, ĝuste kiam la rizpiralidoj eloviĝis, tiel ke ili estis tute ekstermitaj nur en kelkaj tagoj.

La centra helpa grupo de filozofia studo de la brigado donis lecionon al la amasoj: Same kiel en aliaj laboroj, ankaŭ en ekstermado de rizpiralidoj ni devas koni ne nur la universalecon de kontraŭdiro, sed ankaŭ ĝian partikularecon, kaj ne povas kontentiĝi pri kono de la ĝenerala leĝo de la objekto, sed nepre devas kapti ĝian apartan leĝon. Nur tiamaniere ni povas akiri en laboroj la atenditan efikon kaj teni iniciativon en niaj manoj.

Paso preter Melonkampo en Nokto

ESTIS profunda nokto. Post longa marŝado, la tria roto de iu trupo de ĈPLA venis al montodorso kaj ekripozis. En la lunlumo armeanoj de la roto vidis, ke maljunulo rapidas al ili vektoportante du pezajn korbojn. Li kriis demalproksime: "Kamaradoj, finfine mi kuratingis vin!"

Tiu-vespere, la tria roto venis al Longkjuan-komunumo de Gingŝan-gubernio de Hubej-provinco kaj ripozis apud melonkampo. Milda venteto jen kaj jen alblovis al ili aromon de melonoj. Post tuttaga marŝado, la vestoj de la batalantoj estis tramalsekigitaj de ŝvito. Tiam ili tre soifis, sed iliaj akvokruĉoj jam estis malplenaj. La politika direktanto Tong Joŭji ĵetis rigardon al la batalantoj kaj la melonkampo, elprenis silkan honoran flagon kaj ekrakontis pri ĝi.

En la batalo por liberigi la urbon Langĝoŭ, la unua plotono de la tria roto embuskis en melonkampo antaŭ la malamika pozicio. Tiam ĝuste estis varma somero. La batalantoj sin kaŝis unu tagon kaj unu nokton. La akvo en iliaj kruĉoj jam longe elĉerpiĝis kaj iliaj lipoj krevis. Kvankam melonoj troviĝis ĉe iliaj manoj, tamen neniu tuŝis ilin, observante la disciplinon ellaboritan de Prezidanto Maŭ por la popola armeo. Post kelkaj tagoj, inter la tieaj popolamasoj vaste cirkulis rakonto pri tio, ke la liberiga armeo ne manĝis eĉ unu melonon. Por laŭdi la disciplinemon de la unua plotono, la stabo de la Nordokcidenta Kamparmeo premiis ĝin per la silka flago.

Dum la direktanto rakontis pri la glora tradicio al la batalantoj, en pajlobudo du maljunaj melongardantoj interkonsiliĝis: "Ni devas regali per melonoj la ĈPLA-anojn, kiuj tre laciĝis pro marŝado en la varmega tago." Ili iris en la kampon kaj komencis deŝiri grandajn melonojn unu post alia. Apenaŭ ili plenigis du korbojn per melonoj, klariono signalis ekmarŝon kaj la roto foriris. Rigardante la siluetojn de la ĈPLA-anoj, unu el la maljunuloj diris decideme: "Mi nepre kuratingos ilin por doni al ili la melonojn."

La faro de la onklo profunde kortuŝis la direktanton kaj batalantojn. Ĉiu melono estis kristalo de la profunda amo de la popolamasoj al la popola armeo! Direktanto Tong Joŭji pensis, ke ili ne devas rifuzi, ĉar la onklo alportis la melonojn demalproksime. Sed, la onklo obstine rifuzis akcepti pagon de la direktanto por la melonoj. Kiam ili puŝis unu la alian, la rotestro ŝtele ŝovis la monon en poŝon de la onklo. Forte premante manon de la onklo, la direktanto diris: "Ni elkore dankas vin, ni nepre rekompencos la zorgon de la popolamasoj per praktika agado."

FUNDAMENTE KONSTRUIĜIS LA UNUA SALPRODUKTEJO DE HUNAN-PROVINCO

Hiangli-a Salminejo, la unua salproduktejo de Hunan-provinco, jam fundamente konstruiĝis kaj komencis produktadon en februaro de la kuranta jaro. Nun ĝi jam havas farejojn de rafinita salo kaj salpetro, kiuj povas liveri 300,000 tunojn da tia salo kaj 16,000 tunojn da salpetro en unu jaro. Ankaŭ aliaj produktaj sekcioj por sinteza utiligo de salo kaj aliaj partoj estas en konstruado aŭ preparado.

En la pasinteco, la salo bezonata de Hunan-provinco estis liverata de aliaj provincoj. Nun, la Hiangli-a Salminejo jam povas fundamente kontentigi la bezonon de salo en industria produktado kaj ĉiutaga vivo en tiu provinco.

El Popola Ĉinio

Esperanta Monata Ilustrita

Specimeno akirebla senpage

ABONTARIFO:

1	jaro	£ 0.50	Can.$ 2.00
2	jaroj	£ 0.75	Can.$ 3.00
3	jaroj	£ 1.00	Can.$ 4.00

ABONU: Ĉe niaj perantoj en diversaj landoj
aŭ rekte ĉe la Libroservo de Ĉina Esperanto-Ligo,
P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

Ĉiu abonanto por la jaro 1973, kiu faros **abonon antaŭ** la 31-a de la venonta januaro, **ricevos belan** esperantan bild-kalendaron.

La Heroa Egipta Popolo Estas Nesubigebla

LA 23-a de julio 1972 estis la 20-a datreveno de la renverso de la feŭda dinastio de Faruk fare de la heroa egipta popolo kaj ankaŭ la nacifesta tago de la Araba Egipta Respubliko.

Frumatene de la 23-a de julio 1952, la Organizo de Liberaj Oficiroj, estrata de la forpasinta egipta prezidanto G. A. Nasser, deklaris armitan ribelon, okupis gravajn lokojn de la ĉefurbo Kajro per tankoj, kontrolis per teraj trupoj ĉiujn kontraŭrevoluciajn elementojn, kiuj havis intiman kontakton kun imperiismo kaj la feŭda dinastio, samtempe okupis la gravajn trafikajn liniojn de la somera ĉefurbo de Faruk Aleksandrio kaj sieĝis la reĝan palacon. La Organizo de Liberaj Oficiroj ricevis subtenon de la popolamasoj kaj rapide frakasis la reziston de Faruk. Je la 26-a de julio la reĝo Faruk estis detronigita, kaj samtage Faruk kaj liaj familianoj forfuĝis alilanden protektate de imperiismo.

En la 24-a de julio 1952 fondiĝis la nova registaro. Ĝi deklaris konfiskon de la tero de la reĝa familio kaj abolon de la kastismo kaj nobelaj titoloj. En la 18-a de junio 1953, la fondiĝo de la Respubliko estis proklamita kaj la reĝa reĝimo estis abolita.

En 1956, post kiam la egipta popolo, por defendi la nacian sendependecon, deklaris reprenon de la kanalo Suezo perforte okupita de imperiismo, Egiptio tuj ricevis kunan armitan atakon de imperiistoj kaj cionistoj. La heroa egipta popolo brave leviĝis por rezistado, fiaskigis la atakon de la malamikoj, defendis Suezon kaj la ŝtatan suverenecon kaj gajnis venkon en la kontraŭagresa batalo. En 1967, kun subteno de la usona imperiismo la izraelaj cionistoj denove komencis armitan agresadon kontraŭ Egiptio kaj aliaj arabaj landoj kaj okupis la duoninsulon Sinajo de Egiptio kaj grandajn pecojn da teritorio de aliaj arabaj landoj. La egipta, palestina kaj arabaj popoloj nun faras senlacan batalon por repreni la perditan teron kaj restarigi la nacian rajton de Palestino. En la kuranta jaro, Prezidanto Sadat ripetfoje deklaris: Estas necese repreni la araban teritorion okupitan de la agresantoj per batalo. La egipta popolo persistanta en la batalo kontraŭ agresado de imperiismo kaj koloniismo ricevis simpation kaj subtenon de la mondaj popoloj.

Je la 24-a de julio, Prezidanto Sadat faris paroladon en la inaŭgura kunveno de la Nacia Kongreso de la Araba Socialisma Unio en kiu li alvokis la egiptan popolon plifortigi sian unuiĝon kaj surŝultrigi la gravan taskon de liberigo de la nacio.

Sadat riproĉis Usonon, ke en januaro 1972 ĝi deklaris daŭran liveradon de taktikaj armiloj al Izraelo, permesis, ke la lasta fabriku armilojn projektitajn de Usono, kaj eskaladis sian psikologian militon kontraŭ Egiptio.

Sadat parolis ankaŭ pri la starpunkto de Sovetunio pri la mezorienta problemo kaj la egipta-sovetunia rilato. Li diris: "Kion Sovetunio donis al ni? Ĝi pledas por fari interparolon kun Usono elirante de pozicio de forto kaj dissemas malesperon inter araboj."

Li diris: "Post la (Usona-Sovetunia) Moskva Supera Konferenco, mi informis al Sovetunio, ke ni devas denove taksi la situacion.

"Unue, mi ne volas, ke eĉ unu sovetunia soldato batalu por ni, sed ni volas nur armilojn. Due, ni ne volas serĉi rektan konflikton inter Usono kaj Sovetunio.

"Tamen, mi ne trovis alternativon por la decido, kiun mi faris kaj vi jam scias."

Sadat diris: "Estas plej malfacile por mi fari tian decidon kontraŭ Sovetunio, sed ne estis alternativo.

"Akceptado de la ekzistanta fakto, bedaŭrinde pledata de kelkaj verkistoj en la arabaj landoj, estos rifuzita, rifuzita kaj rifuzita.

"Ni alvizaĝas la plej danĝeran decidon, ke la egipta kaj araba naciismo staru, eĉ sola, sur la batalkampo. Aliaj kaj ni mem iam alfrontis tian situacion kaj gajnis venkon. Ni leviĝos kaj rezistos, ĉar ni neniam esperis, ke niaj amikoj batalos por ni."

Egiptaj popolamasaj organizoj kaj personoj telegrafis unuj post aliaj al Prezidanto Sadat por esprimi sian subtenon al la decido fini la mision de la sovetuniaj mi'itaj konsilistoj.

La registaro kaj popolo de Egiptio subtenas la justan batalon de la subprematai nacioj kaj popoloj kontraŭ imperiismo kaj koloniismo. Ili subtenas la batalon de la palestina popolo por sia nacia liberiĝo, la kontraŭusonan kaj nacisavan batalon de la tri hindoĉiniaj popoloj kaj la naciliberigan movadon de Afriko kontraŭ la koloniisma kaj rasisma regado kaj por la nacia sendependeco. La egipta popolo faris gravajn kontribuojn al la unuiĝa kaj naciliberiga afero de la arabaj, aziaj kaj afrikaj popoloj kontraŭ imperiismo.

En la pasintaj 20 jaroj, por firmigi sian nacian sendependecon, la egiptaj registaro kaj popolo ankaŭ klopodis por disvolvi la nacian ekonomion. En la 5 jaroj post la milito de "la 5-a de junio", kvankam la egipta popolo uzis sian plejparton de la homforto kaj monrimedo por la prepa-o por batalrepreni la perditan teron, tamen ĝia industria kaj agrikultura produkto havas certan disvolviĝon kompare kun tiu antaŭ 20 jaroj.

Post la revolucio de "la 23-a de julio", Egiptio adoptis pozitivajn aranĝojn por disvolvi nacian ekonomion, kiaj limigo de fremdlandaj kapitaloj, ŝtata repreno de la Kompanio de la Kanalo Suezo regata de imperiismo, bankoj, asekuraj kompanioj kaj aliaj gravaj entreprenoj kaj kompanioj funkcigataj per fremda kapitalo. Tiuj aranĝoj metis bazon por disvolvi la nacian ekonomion de Egiptio. Poste, la egipta registaro adoptis serion da ŝtatigaj aranĝoj por meti plejparton de la gravaj fabrikoj kaj minejoj, ekonomiaj fakoj en la trakon de ŝtata kapitalo. Antaŭ la revolucio de "la 23-a de julio", krom ŝpinteksejoj kaj riparejoj, Egiptio preskaŭ ne havis industrion. Nun, Egiptio ne nur multe disvolvis la tradician ŝpinteksan industrion, sed ankaŭ ekhavis kaj disvolvis petrolan, kemian, maŝinfabrikan kaj aliajn industriojn. Ĝia produkta kvanto de nafto kreskis de 2,340,000 tunoj de 1952 ĝis 15,000,000-20,000,000 tunoj en 1972.

La ŝpinteksa industrio estas la tradicia kaj ĉefa industrio de Egiptio. Kvankam Egiptio fame konatiĝas kiel lando de kotono, tamen, en la pasinteco, ĝi eksportis kotonon kaj importis kontonajn teksaĵojn. La fenomeno de neracia kaj kolonia ekonomio nun jam estas radikale ŝanĝita. Formiĝis grandaj kaj modernaj ŝpinteksaj centroj. La produkta valoro de ŝpinteksa industrio en 1971 kreskis 3.5-oble kompare kun tiu de 1952. La ŝpinteksaĵoj ne nur sufiĉas por kontentigi la bezonon de la enlanda merkato, sed ankaŭ povas esti eksportataj.

La egipta revolucio ankaŭ akcelis la disvolviĝon de la agrikulturo. La registaro organizis akvoutiligan konstruadon, ekspluaton de virga tero kaj reformadon de dezerto. En la pasintaj 20 jaroj, proksimume 900,000 akreoj da dezerto ŝanĝiĝis en kultureblajn kampojn kaj pli ol 800,000 akreoj da kampoj unufoje kulturitaj en unu jaro estis ŝanĝitaj en tutjare kultureblajn. Tio ebligis al la egipta agrikultura produkto grandskalan kreskon. La totala produkta valoro de agrikulturo en 1971 estis 1,022,000,000 egiptaj pundoj, t.e. pli-ol-5-oblo de tiu de 1952.

La industria kaj agrikultura disvolviĝo de Egiptio ludis tre gravan rolon por defendi la nacian sendependecon kaj levi la vivnivelon de la popolo.

La historio jam montris, ke la heroa egipta popolo estas nesubigebla.

EGIPTIO KAJ LIBIO PUBLIKIGIS DEKLARACION PRI PLENA UNUIĜO

La egipta prezidanto Anvar Sadat kaj la prezidanto de la Libia Revolucia Komanda Konsilantaro Omar Moamer Kazafi subskribis, je la 2-a de aŭgusto, deklaracion en Benghazi de Libio, por proklami la unuiĝon de la Araba Respubliko de Egiptio kaj la Araba Respubliko de Libio en unu unuigitan ŝtaton je kiel eble plej granda rapideco.

La deklaracio diras: "La Revolucio de la 23-a de Julio (de Egiptio) kaj la Revolucio de la 1-a de Septembro (de Libio) devenis de la sama fonto, marŝas sur la sama vojo kaj sin direktas al la sama celo." Ĝi diras: "La egipta kaj libia popoloj kunligiĝas per striktaj kaj diversaj geografiaj, historiaj, ekonomiaj, politikaj, homaj kaj ideologiaj rilatoj, portas certajn respondecojn kaj devojn al la araba nacio," kiuj estas "klara devo servi la superajn naciajn celaĵojn malgraŭ ĉia malhelpo kaj alvokas, ke ili faru urĝan komunan klopodon por realigi la araban esperon pri unuiĝo".

La deklaracio esprimas, ke la du landoj jam interkonsentis pri kiel eble plej rapida establo de plena unuiĝo sur la plej firma bazo.

KOMENTARIO DE LIBANA ĈEFMINISTRO PRI LA DECIDO DE SADAT PRI FINO DE LA MISIO DE LA SOVETUNIAJ MILITAJ KONSILISTOJ EN EGIPTIO

Saeb Salam, ĉefministro de Libano diris je la 31-a de julio en akcepta kunveno de ĵurnalistoj en Beirut, ke la decido de Sadat pri fino de la misio de la sovetuniaj militaj konsilistoj en Egiptio estas "granda paŝo kaj Egiptio denove pruvis ke ĝi scias kiel protekti sian suverenecon kaj ke ĝi decidis liberigi la okupitajn teritoriojn."

Li diris, ke la decido montras ke Egiptio estas la mastro de siaj agoj.

STABESTRO DE LA SIRIAJ ARMITAJ FORTOJ ESPRIMIS SIAN VOLON KONTRAŬBATALI CIONISMON PER ARMITAJ FORTOJ

Je la 1-a de aŭgusto, "Popola Armeo", la semajna organo de la armitaj fortoj de Sirio, publikigis parolojn de la stabestro kaj aliaj altrangaj oficiroj de la armitaj fortoj de Sirio al ĵurnalistoj okaze de la 27-a datreveno de la fondiĝo de la siria armeo.

Majorgeneralo Youssef Shakour, stabestro de la armitaj fortoj de Sirio emfazis en sia parolo: "La siriaj armitaj fortoj memoru jenon: nur per armitaj fortoj ni povas repreni kion la cionismaj malamikoj forrabis."

FRANCA LEGANTO R.M. SKRIBIS:

Nun mi regule ricevadas "El Popola Ĉinio" kun variaj artikoloj pri ĉio, kaj ĉiam ĝuas ĝian enhavon. Ofte mi relegas la verkojn de Prezidanto Maŭ Zedong, kaj daŭre trovas en ili utilajn konsilojn kaj meditendaĵojn. Mi esperas, ke baldaŭ aperos la aliaj volumoj de la elektitaj verkoj. . .

SVEDA LEGANTO A.F. SKRIBIS:

Ni popolo en kapitalistaj landoj bezonas mallongan artikolon pri la nuna vivo de via popolo, kiun oni rakontas en komparo kun granda mizero dum la pasinta tempo. Parolu en mallonga artikolo pri via kontraŭjapana militо. Rakontu mallonge ekz-e, nur per 4 paĝoj. Tiuj longaj artikoloj estas tre malfacilaj por komencantoj en nia kara lingvo Esperanto.

SVEDA LEGANTO T.N. SKRIBIS:

Aperis jam n-ro 6 de EPĈ. . . , kun ĝojo mi konstatis post rapida foliumado, ke ĝi estas eĉ pli bona ol n-ro 5, kiu estas la plej bona ĝis tiam kompare kun pluraj jarserioj, t.e. kun multaj artaj bildoj. La koloraj fotoj, kiuj abundis dum kelkaj jaroj, malofte estis vere plaĉaj, la nigra-blankaj ĝenerale pli bonaj. . . kaj kiam temas pri veko de intereso por via afero, la longaj gravaj artikoloj ne multe valoras.

En Konstruado de Fervojo de Amikeco

SUR la longa konstrua linio de la Tanzania-Zambia Fervojo en Tanzanio dekmiloj da tanzaniaj kaj ĉinaj laboristoj kaj teknikistoj konstruas amikecan fervojon, kiu trapasas la belan kaj fekundan orientan Afrikon, kaj ili laboras ŝultro-ĉe-ŝultre sub la brula suno, hakante dornojn kaj montojn kaj konstruante pontojn super riveroj.

Antaŭ pluraj monatoj okazis tie du kortuŝajoj de reciproka savo de tanzaniaj kaj ĉinaj laboristoj en danĝero.

MHINGA SIN RISKIS POR SAVI ĈINAN KAMARADON

En novembro de la pasinta jaro, intense iris la fosado de la tunelo n-ro 2 de Lumumwe. La tanzaniaj kaj ĉinaj konstruantoj multe rapidigis la tunelfosadon, dank' al samtempa fosado en supra kaj malsupra fosejoj. La elfosita gruzo en la supra fosejo falis en la malsupran tra funelo instalita inter ili kaj poste esti portita eksteren.

Je la tagmezo de la 24-a, kiam venis la tempo por tagmanĝi, la ĉina teknikisto Jang Jongfu ankoraŭ persistis en transportado de gruzo. Li kalkulis en si, ke nur 3-4 fojoj sufiĉos por transporti la restantan gruzon. Sed neatendite du ŝtonegoj ruliĝis malsupren kaj ŝtopis la funelon. Jang Jongfu tuj rapidis al la kamaradoj en la supra fosejo kaj provis kune kun ili faligi la ŝtonegojn per fera stango. Tamen la ŝtonoj interpremiĝis tiel firme, ke ili restis senmovaj. Kun malpacienco li movis sin tiel forte, ke li mislokis sian piedon kaj glitis en la funelon. Ankaŭ amaso da gruzo puŝiĝis kune kun li en la funelon kaj tuj glutis lin ĝis la brusto. Vidante ke okazis akcidento, la aliaj maltrankviliĝis kaj tuj klopodis por lin savi.

Informiĝinte pri tio, tanzania laboristo Mhinga tagmanĝanta tuj alrapidis por urĝa helpo. De kiam Mhinga partoprenis en la konstruado de la fervojo, li ĉiam laboris kun Jang Jongfu kaj tiel ili fariĝis intimaj kunbatalantoj. Vidante ke lia amiko sin trovas en danĝero, Mhinga ekstreme maltrankviliĝis. Li kuris al la malsupra fosejo kaj rapide kaj atenteme subfosis gruzon el la funelo per ŝovelilo.

Dank' al la kuna klopodo de ambaŭlandaj laboristoj, plejparto de la gruzo estis eligita kaj malkaŝiĝis la tuta korpo de Jang Jongfu en duonsvena stato. En tiu momento la ĉeestantoj tamen ankoraŭ pli maltrankviliĝis, ĉar Jang Jongfu falis ĝuste en fendon inter la du ŝtonegoj. Se la ŝtonegoj ekmoviĝus, certe perdiĝus la vivo de Jang Jongfu. Je tiu kriza momento, Mhinga tuj etendis siajn fortajn

Intime interparolas la ĉina teknikisto Jang Jongfu (la dua de dekstre) kaj la tanzania laboristo Mhinga (la unua de dekstre).

brakojn kaj subtenis la du ŝtonegojn kun pezo de pli ol 50 kg., por ke aliaj kamaradoj elprenu la restantan gruzon en la funelo kaj elĉanĝerigu Jang Jongfu. Subite pinta ŝtono falis sur lian maldekstran brakon kaj pikis ĝin kaj la vundo akre lin doloris. Mhinga konsciis, ke li subtenas ne nur du ŝtonojn, sed ankaŭ la vivon de la ĉina kamarado kaj la profundan amikecon inter la popoloj de Tanzanio kaj Ĉinio. Pensante tion li tutforte kaj senmove subtenis la ŝtonegojn kunpremante siajn dentojn.

Fine Jang Jongfu saviĝis el inter la ŝtonegoj. La ĉinaj teknikistoj multe dankis al Mhinga pro lia helpo. Mhinga forgesis sian doloron kaj portis Jang Jongfu el la fosejo kune kun la aliaj. Vidinte ke lia ĉina amiko estas vundita je multaj lokoj sur la korpo, li eklarmis neteneble kaj plorante vokis: "Rafiki (amiko)! Rafiki!"

JAN VANGUO ŜIRMIS TANZANIAN FRATON PER SIA KORPO

Unu monaton poste, en la antaŭtagmezo de la 23-a de decembro, kiam la veterana ĉina laboristo, grupestro Jan Vanguo kun siaj kamaradoj sub sia gvido riparis la flankajn murojn ekster la tunelo n-ro 1 apud Mpanga-rivero kaj renkontis malmolan rokon, ili do faris bortruojn por ĝin eksplodigi.

Antaŭ eksplodigo, Jan Vanguo deĵoris, laŭ la sekureca regularo, ĉe la enirejo de la tunelo por bari aliajn trapasi la malpermesitan zonon.

La meĉoj estis ekbruligitaj. En tiu momento la tanzania laboristo Naulese grandpaŝe elkuris subite el la tunelo por preni bezonatan cementon, ne atentante, ke ekstere oni faras eksplodigon. Vidinte lin Jan Vanguo tuj alrapidis por lin haltigi, sed altkreska Naulese kuris tiel rapide ke en palpebruma momento li jam enkuris la malsekuran zonon. Jan Vanguo plirapidigis siajn paŝojn kaj kriis: "Haltu! Haltu!" Tamen li ne sukcesis haltigi lin pro lingva baro kaj bruo de maŝinoj en la konstruejo.

La flagrantaj meĉoj estis tuj finbrulontaj. En tiu alarma situacio, Jan Vanguo kuratingis per grandaj paŝoj kaj tutforte premfaligis Naulese sur la teron. Pum! pum! Ĝuste en tiu tempo aŭdiĝis eksplodoj ne fore antaŭ ili. Jan Vanguo atente ŝirmis Naulese per sia korpo. La bortruoj estis faritaj laŭ la postulo, la ŝtonpecoj sin ĵetis rekte al la kontraŭa muro kaj feliĉe ne al la loko kie ili kuŝis.

Post la eksplodo, Jan Vanguo liberiĝis de maltrankvileco, levis Naulese kaj forigis la polvon sur liaj vestoj, kaj dume demandis lin zorgeme, ĉu li estas vundita pro la ĵusa faligo. En tiu tempo Naulese jam komprenis, kio okazis kaj firme premis la manojn de Jan Vanguo kaj diris kun emocio: "Rafiki! Mi tre dankas vin ke vi min savis." Frapante lian ŝultron Jan Vanguo respondis: "Mi tre ĝojas, ke vi estas ne vundita."



Kuniĝas en la Gvata Stacio la du partoj de la fervojo respektive konstruitaj de Dares Salaam kaj Mlinba.

La Elefantido Mithura

EN festaj aŭ liberaj tagoj, ĉie en la Pekina Zoologia Ĝardeno troviĝas vizitantoj, inter kiuj la plej fervoraj estas geknaboj. En la ĝardeno estas bredataj miloj da diversaj raraj birdoj kaj bestoj, kiuj allogas vizitantojn. Multaj geknaboj tiel ŝatas rigardi elefantojn, ke ili longe ne volas forlasi la vastan elefantan domon.

Antaŭe, en la domego loĝis tri grandaj elefantoj, kaj lasttempe envenis iu nova "amiko" Mithura. Ĝi estas donaco de Sirimavo Bandaranaike, ĉefministro de Sri-Lankao, al la ĉinaj geknaboj en la nomo de la Sri-lankaaj geknaboj.

Nun Mithura vivas komforte kaj senĝene. Ĝi malrapide paŝadas tien kaj reen en sia pura domego, kaj ĝi jen palpebrumas jen vostumas. Ĝi ofte ŝatas levi kaj etendi sian longan rostron tra la fera balustrado al knabinoj en bunta jupo, kvazaŭ ĝi volus saluti al ili per manpremo. Kiam geknaboj vokas "Mithura", ĝi ofte fiere levas siajn kapon kaj orelojn kvazaŭ dirante, ke ĝuste ĝi estas Mithura. Ĝi jam ne sentas timon kaj fremdecon antaŭ svarmaj rigardantoj.

Interesan travivaĵon havas la elefantido, kiu simbolas profundan amikecon inter la geknaboj de Sri-Lankao kaj Ĉinio. Nun Mithura jus atingis aĝon de du jaroj kaj sep monatoj. Antaŭ pli ol du jaroj, kiam ĝi estis apenaŭ trimonata, ĝi jam fariĝis orfo pro perdo de sia patrino dum serĉado de manĝaĵo. Poste kamparanoj ĝin trovis kaj nutris. Tiam Mithura scipovis nur suĉi mamojn, sed ne manĝi herbojn. Sekve, la kamparanoj donis ĝin al zoologia ĝardeno, kie ĝi ĝuis bonan nutradon de bredistoj. Tiamaniere Mithura sane kreskis dum pli ol du jaroj. Iom post iom ĝi komencis manĝi pulvorigitan lakton, ananason kaj morusarbajn foliojn. Ĉifoje, kune kun la honoraj gastoj de Sri-Lankao ĝi veturis per aeroplano trans maroj al Pekino, kiel amiko de la ĉinaj geknaboj.

Nuntempe Mithura jam pezas pli ol 150 kilogramojn kaj altas ĉ. unu metron, sed ĝiaj lanugoj estas ankoraŭ longaj kaj ĝiaj eburoj nur du malgrandaj blankaj punktoj. Ĉiutage la elefantido estas nutrata per pulvorigita lakto, kaj ankaŭ per ananaso kaj sudanherboj plantitaj de laborantoj en la zoologia ĝardeno. La bredistoj de la ĝardeno zorgeme nutras ĝin kaj ili ankaŭ volas dresi ĝin por blovi buŝharmonikon kaj skui sonorilon. Certe kreskos sane la elefantido Mithura, la simbolo de la amikeco inter la geknaboj de Ĉinio kaj Sri-Lankao.



La elefantido Mithura en la Pekina Zoologia Ĝardeno

Mithura kaj la pekinaj geknaboj

Fariĝu EPĈ-abonigantoj

Por kontentigi la bezonon de vastaj esperantistaj amasoj, kiuj deziras koni la Ĉinan Popolan Respublikon, kaj ĝustatempe havigi al ili nian monatan esperantan gazeton "El Popola Ĉinio", estas dezirinde, ke ĉiuj lokaj Esperanto-societoj (grupoj) tra la tuta mondo funkciu kiel niaj EPĈ-abonigantoj!

Kion faras la abonigantoj?

Anonci nian gazeton "El Popola Ĉinio" al la lokaj esperantistoj, varbi abonantojn kaj transsendi la abonilojn al la Libroservo de ĈEL, P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

La abonigantoj povas ĝui:

a. 30% rabaton el la abonpago;

b. senpagan donacon de ĉiuj specimenoj de novaj ĉinaj esperantaj eldonaĵoj (inkluzive la gazeton EPĈ).

Rekte Kontaktu kun la Libroservo de ĈEL!
"Regularo de Abonigantoj" akirebla post peto!

SENĈESE DISVOLVIĜAS LA MEKANIKIGO DE LA FIŜKAPTADO DE ĜEGIANG

La fiŝkaptaj laboristoj kaj fiŝistoj de Ĝegiang-provinco aktive disvolvas la mekanikigon de fiŝkaptado kun la revolucia spirito de sinapogo sur propraj fortoj kaj penema luktado en malfaciloj. Nun, 95 pocentoj de la fiŝkaptaj komunumoj kaj brigadoj en tiu fiŝkapta regiono jam havas motorajn velŝipojn kaj parto de ili jam efektivigis mekanikigon de fiŝado. Nemalmultaj komunumoj kaj brigadoj instalis avangardajn fiŝkaptilojn sur siaj motoraj velŝipoj. Miloj da motoraj velŝipoj en Ĝoŭŝan-regiono levas reton per motora vinĉo, serĉas fiŝarojn per specialaj aparatoj kaj interkomunikas per radiaj aparatoj dum laborado. La komunumoj kaj brigadoj en tiu regiono starigis 52 fabrikojn de fiŝkaptaj maŝinoj. Dank' al energia plimultigo de motoraj velŝipoj, multe grandiĝis la produktokvanto de fiŝoj en la proksima maro de Ĝegiang. En 1971, la totala produktokvanto de maraj fiŝoj de la tuta provinco estis 6-oblo de tiu en la komenca periodo post la Liberiĝo kaj 70 pocentoj de tiu kvanto estis kaptita per motoraj velŝipoj.

LA PIVOTA AKVOUTILIGA KONSTRUAĴO DE GIANGDU EKFUNKCIIS

Per la pivota akvoutiliga konstruaĵo de Giangdu de Giangsu-provinco, kies ekipaĵoj estas faritaj kaj instalitaj de nia lando mem, komencis konduki akvon de Jangzi-rivero al Huajhe-rivero.

Tiu ĉi plej granda elektra drena kaj irigacia konstruaĵo de nia lando kompletigita en la granda kultura revolucio konsistas el pli ol 10 partoj inkluzive de 3 grandaj modernaj elektraj pumpstacioj, 7 mezgrandaj akvoreguligaj kluzoj kaj 3 ŝipkluzoj. Ĝi povas irigacii kaj dreni per elektraj maŝinoj kaj sen helpo de ili. En tempo de trosekeco, ĝi povas pumpi akvon el Jangzi-rivero en la irigacian regionon de la Granda Kanalo por akvumi pli ol 3 milionojn da muoj da kampoj de Giangdu kaj aliaj 4 gubernioj; en tempo de inundo, ĝi povas dreni superakvon en la regiono de Lihiahe en Jangzi-riveron kaj multe mildigi la inundan katastrofon en tiu regiono. Tiu ĉi konstruaĵo multe kontribuis por la batalo kontraŭ trosekeco kaj inundo kaj akiro de sinsekvaj riĉaj rikoltoj en la pli ol dek gubernioj kaj urboj en la regiono de Lihiahe en norda Giangsu.

RIĈA RIKOLTO DE ROZOJ

En la kuranta jaro, riĉa rikolto de rozoj estas akirita de Mejguj-komunumo de Pingjin-gubernio de Ŝandong-provinco. La totala produktokvanto atingis pli ol 40,000 kilogramojn, t.e. 80 pocentojn pli multe ol tiu en la pasinta jaro. Ankaŭ la kvalito de la rikoltaĵo rimarkinde altiĝis.

Rozo estas grava spicaĵo por manĝaĵindustrio, sekigitaj rozbutonoj povas esti uzataj kiel drogo, ĝiaj radikoj kaj ŝeloj povas esti uzataj kiel kolorigilo kaj rozoleo estas materialo por fari altklasajn aromaĵojn. La rozo produktita de la nomita komunumo karakteriziĝas per dikaj petaloj, malhela koloro kaj intensa odoro kaj ĝuas altan prestiĝon en la merkato.

TRANSISTORA APARATO POR KVAR UZOJ

Laŭ bezonoj en la kamparo, la Ŝanhaja Dua Fabriko de Ludilaj Partoj fabrikis transistoran aparaton uzeblan kiel 6-transistoran radioricevilon kun tri bendoj, durapidecan gramofonon, 1.2-vatan laŭtparolilon kaj telefonan aparaton. Tiu ĉi aparato povas funkcii per sekaj piloj aŭ alterna kurento. Kun grandeco de iom dika libro, ĝi taŭgas por uzado en produkta grupo de popola komunumo, insulo, malgranda fabriko kaj aliaj kolektivoj.

Sur la kovrilo:

Danco de granda unuiĝo inter diversaj naciecoj

Sur la dorskovrilo:

Hiŝuanbanna de Junnan-provinco

EL POPOLA ĈINIO 人民中国杂志

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO--LIGO

P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 10 (171) 1972

Ĉefa Enhavo

20-jara Funkciado de la Ĉengdu-Ĉongking-a Fervojo. . . 1

La Geologia Afero de Ĉinio..... 6

Novaj Sukcesoj en Akvoutiliga Konstruado de Ŝandong-provinco 9

Fabriko Bonvena al Kamparanoj.....13

La Eduka Afero de Janbian en Prospera Disvolviĝo.....16

Amikeco Floras sur Stepo.....19

"Brodado" *(poemo)* 21

Jaŭ-nacia Kadro Lan Hajhong.....22

Komuna Higiena Afero de Hefej.....27

Rakontoj pri Lusin.....31

Nokto de Montvilaĝo.....34

La Ĝardenoj en Suĝoŭ.....37

Silkaj Bildoj de Ĉinio.....39

"Eksterordinaraj Rizpiralidoj".....41

Paso preter Melonkampo en Nokto.....42

La Heroa Egipta Popolo Estas Nesubigebla.....44

En Konstruado de Fervojo de Amikeco.....47

La Elefantido Mithura.....49

La Ŝanhaja Danco-Lernejo



Angulo de la Ŝanhaja Danco-lernejo



Ludado por kamparanoj



La Ŝanhaja Danco-lernejo fondiĝis en la jaro 1960. En ĝiaj du fakoj de baledo kaj naciaj dancoj nun troviĝas pli ol 330 lernantoj.

En la Ŝanhaja Danco-lernejo iras batalo inter du linioj. Sub la influo de la reviziisma linio de literaturo kaj arto kaj edukado, antaŭ la Granda Proletara Kultura Revolucio la programeroj prezentitaj de ĝi plejparte temis pri princoj, princinoj, feinoj, demonoj ktp., kaj deviis de la linio de literaturo kaj arto servi al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.

Sub la direktado de la proletara literatura kaj arta linio de Prezidanto Maŭ, la revoluciaj instruistoj kaj lernantoj de la Ŝanhaja Danco-lernejo batalis kontraŭ la kontraŭrevolucia reviziisma literatura kaj arta linio, profundiĝis en la socian vivon por reformi sian ideologion. En 1964, ili komencis provludi malgrandan baledon "Blankhara Knabino" kaj post forigo de la malhelpo kaj subfoso faritaj de la reviziisma literatura kaj arta linio, finfine naskiĝis la grandtipa revolucia moderna baledo "Blankhara Knabino", kiu pli kaj pli perfektiĝis kiel frukto de la proletara revolucia literaturo kaj arto kaj estas multe ŝatata de la vastaj amasoj.

Geaktoroj interbabilas en ripo[illegible]
dum paŭzo de ludado.



"Blankhara Knabino" ludata de la
Sarthaja Danco-lernejo

Aktorinoj sin ekzercas en bazaj dancaj movoj.



Aktorinoj lernas de kore
kunbatalantino dancon d
subteno al la armeo en l
korea revolucia opero "Sa
ga Maro".

Kore interparolas Ma
Hujfang, kiu ludas la rolo
de Hier antaŭ blankiĝ
de ŝia hararo kaj Ŝi Ĝong
kin, kiu ludas la rolon d
Hier post blankiĝo de ŝi
hararo, kaj Morišita Joko
aktorino de la japan
Macujama Baleda Trup
kiu ludas la tutan rolo
de Hier.

Ĉi tie la pejzaĝo estas senkompare bela

Lignogravurajo de **Giang Hjueliang**

6611

世界語《人民中国报道》一九七二年第十期（本刊代号二——九一五）